

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Centjariĝas nia teatro

**Afrika kongreso
en Tanzanio**

Vekiĝu Eŭropa ILEI

**La Akademio
kun nova estraro**



Enhavo

- 21 Afriko: Ĉu kontinento de espero? (Jesper Lykke Jacobsen, Alan Iwi)
- 22 La unua estis brandfaristo (Zofia Banet-Fornalowa);
Zamenhof pri E-teatro
- 24 Instruado: Ĉu instruistoj interkompreniĝas? (Mauro La Torre);
Eŭropa ILEI: montru vin! (Renato Corsetti); E-kurso ĉe ŝtata
universitato; "Italanto" (Gabriel Aquilina); Bona bazo por plena
enlingviĝo (recenzo de Paul Gubbins, *Kunvojaĝu*; Georgo Kamaĉo);
Du kunligiloj de teorio kaj praktiko (recenzo de Rudolf Rakuša,
Metodiko de la Esperanto-instruado, kaj de Irena Szanser, *Teorio
kaj praktiko de lingvo-instruado*; Sabine Fiedler)
- 25 ZEO-j: persvadu aŭtoritatojn (Osmo Buller)
- 28 Scienco: AIS, UEA: paŝoj al kunlaboro (Amri Wandel, Hans Michael
Maitzen); AIS dekjara (Reinhard Fössmeier)
- 29 Fakaj asocioj: Interkulturaj emocioj, spertoj kaj scioj (Ulrich Becker);
Informfolioj en ĉiuj EU-lingvoj
- 30 Akademio de Esperanto: Nova estraro frontas dilemojn de modernio
- 32 Premio de EVA/Edistudio (Gerrit Berveling)
Recenzoj: *La Kunularo de l' Ringo* (Anna Löwenstein); *La aboco
de tempoplanado* (Douglas Draper); *Fragmentoj* (Antonio Valén);
La buton-milito (Georgo Kamaĉo); *Sukcesa mamnutrado* (Fabienne
Berthelot); *Kantoj de l' popolo* (Poul Thorsen)
- 35 Laste aperis
- 36 Forumo: Pledo por pli da precizo (Bernard Golden);
Kiel fidela hundo (Valencia Esperanto-Grupo)
Fake – Persone – Loke
- 39 Anoncetio; Oficiala informilo
- 40 Nekrologoj: Edward Symoens (1915-1995);
Josef Vondroušek (1904-1995)

Vi trovos

demandon sur p. 34: ĉu vi respon-
dos jese? Ni esperas tion, por resti
kun vi pluan jaron, pluajn jarojn.

Cent jarojn jam restas kun ni la
Esperanta teatro. Kvankam oni
povus ricevi la impreson ke ĝi estas
margena — ĉar malofte ĝuebla —
parto de nia kulturo, ĝi tamen ludis
gravan parton en la establiĝo de
Esperanto kiel parolata lingvo. Ho-
diaŭ, kvankam forvelkis ekzemple
la Teatra Festivalo de Budapeŝto,
la ĝenro plu viglas en kongresoj kaj
renkontiĝoj — kaj ĝi povus vigli pli
sur vidbendoj. Zofia Banet-Forna-
lowa raportas por ni (p. 22) *bildige*
pri la unua konata prezentado es-
perantlingva, en Smolensk, 1896.

Afriko: ĉu kontinento de espero
aŭ de malespero? — Nia raportisto
el la Kvara Afrika Kongreso (p. 21)
ŝajnas pesimisma ĉi-rilate, sed ĉu
ne ĝuste la serio da kontinentaj
kongresoj en la lastaj jaroj (1990,
1991, 1994, 1995) agordu nin al
optimismo, almenaŭ koncerne la
Esperanto-movadon en la varma
kontinento?

La kovrilo: Panajot Dobrev rolas
drinkulon en *La eta princo*, kiun
prezentis Ŝtata Pupteatro de Sliven
(Bulgario) en la Atena UK (1976).

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofinio: la 10-a de la antaŭa
monato. **Fondita** en 1905 de M. P.
Berthelot (1882-1910). **Establiĝita** kiel
organo de UEA en 1908 de Hector
Hodler (1887-1920). **Legata** en 115
landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld.
61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp);
petu informojn ĉe via landa asocio
aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa
ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p.
1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p.
175. Movada rabato 50%. Ekstera-
kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato
por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj
de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:    

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj):
prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae
Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong,
Taegu 706-031, Korea Respubliko;
☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-
0880 [h]; ✉ +82-53-950-6247 [of], +82-
53-765-0881 [h]; ☐ keast@soback.
kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okci-
denta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edu-
kado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse
des Charpentiers, FR-57100 Thionville,
Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia pla-
nado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark
Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa,
Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-
9282 [of/h]; ✉ +1-613-565-9279 [of/h];
☐ mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado):
d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9,
NL-7913 VV Hollandscheveld, Neder-
lando; ☎ +31-5284-1214 [h], +31-50-
613769 [of]; ✉ +31-50-613763 [of];
☐ azgiow6fred@relay.nl.net.

Estrarano (landa agado: Orienta
Eŭropo, Azio, Oceanio; informado):
s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-
3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-
739776 [h], +370-7-208242 [of];
✉ +370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO):
s-ino Michela Lipari, viale Giulio
Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio;
☎ +39-6-39-72-61-98 [h]; ✉ +39-6-39-
72-61-69 [h]; ☐ mc8750@mcclink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado):
prof. Amri Wandel, 767 Makabim,
IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462
[h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-
658-4437 [of]; ☐ amri@vms.huji.ac.il.

Ĉu kontinento de espero?



Foto: Tapio Sormunen

La plej forta movado en Orienta Afriko estas sendube tiu en Tanzanio. Ĝi gastigis la 38 partoprenantojn de la Kvara Afrika Kongreso, la unua en tiu kontinent-parto, inter la 26-a de decembro 1995 kaj la 3-a de januaro 1996, en Moshi.

Kun sep aliaj eŭropaj partoprenantoj el ses landoj, mi elaviadigliĝis en plaĉa krepuska varmeto kun cikada ĉirpado. Lokaj esperantistoj venigis nin al la kongresejo, la Internacia Lernejo en Moshi. La realo dementis kelkajn miajn antaŭjuĝojn: ekzistis tie molaj litoj, fridujo kaj eĉ naĝbaseno. La unuaj du tagoj celis ĉefe la aklimatigon de eŭropanoj. Dum 28 afrikanoj (el Tanzanio, Zimbabvo kaj Burundio) iom post iom alvenis, ni interkonatiĝis, eklernis la svahilan, kaj ekskursis per ĉiaterenaj aŭtoj Land Rover al la Nacia Parko de Arusha. Poste, meze de la kongresa semajno, ni vizitis ankaŭ la Naciajn Parkojn Tarangire kaj Kilimanĝaro, kun ties mondkonata monto (sur la foto).

La oficiala inaŭguro okazis aŭspiciate kaj ĉeeste de la regionestro de Kilimanĝaro. Ĝuinte esperantigon de la nacia himno, li promesis certigi ke esperantistoj povos libere disvastigi sian lingvon en la regiono — promeso valora, ĉar jam sentebliis malhelpoj fare de tiuj kiuj supozas Esperanton minaco al la ĝenerala lernado de la tutnacia svahila lingvo.

Enkonduke al la kongresa temo “Imagoj de Afriko: kontinento de

espero aŭ de malespero?”, Minani Matabaro (Zairio/Tanzanio) skizis la historian, politikan kaj socian evoluon de la kontinento, kaj opiniis ke la okcidentaj nacioj ignoras la demokrati-bezonon de Afriko je propra risko, ĉar sen demokratiĝo Afriko ne povas paciĝi, kaj tutmonda stabileco ne eblas dum afrikanoj sangas. Fine li sin turnis al la eŭropaj ĉeestantoj: “Kaj kion vi povas fari por ke Afriko fariĝu kontinento de espero?” La posta diskuto klare montris ke ne nur mi surpriziĝis pro tia naiveco; ĉu vere eblas kredi ke Eŭropo, kiu ja nun havas pli da etnaj, integriĝaj kaj unuiĝaj problemoj ol ĝi antaŭ jardeko entute povus imagi, amase helpu al kontinento je mondscale tiom malatentata politike kaj ekonomie? Kun bedaŭro mi raportas ke tiu kredo multfoje reaperis dum la sekvaj tagoj. Sed la multaj komentoj de la kongresanoj nin tuj kondukis al interesaj konsideroj pri demokratio afrika kaj ties premisoj.

Oliver Mazodze (Zimbabvo) prelegis pri “Afrikaj vortradikoj en Esperanto” — fakte pri ties manko. Li proponis enkondukon de tiaj, almenaŭ por afrikaj realaĵoj. Aŭdiĝis la opinio ke oni unue

konigu mondscale tiujn realaĵojn, kaj tiam la vortaro mem sekvos.

El la riĉa programo menciindas ankaŭ progresiga E-kurso, prezento de la terapia masaĝo Yumeiho (Gholamreza Azarhoushang el Irano), lum-bildoj pri Tanzanio (la estro de la Internacia Lernejo), jarkunveno de Tanzania E-Asocio (TEA) kun estraraj elektoj, kaj la jarfina festo kun tradiciaj muzikistoj el Moshi.

Kvankam ni ne atingis iun rezolucion pri la definitiva solvo de la afrikaj problemoj, la kongreso tamen estis grandega antaŭenpuŝo por la ĝermanta tanzania movado. Unue, tiu pruvis sin matura aranĝi internacian kongreson. (La LKK-n estris la sekretario de TEA, Costantine Mashauri.) Due, la ĉeesto de diversaj eminentuloj certe montriĝos avantaĝa por la publikaj rilatoj. La serioza atento de la estro de lernejo havanta anojn el 31 landoj ja neniel malutilos, kaj oni juste nomu sukcesoj la kongresfinan oratoraĵon de la vicministrio pri edukado kaj kulturo, Gladness Mziray, kiu atestis pri sincera kompreno de niaj idealoj. Por mi, eŭropano, aparte ĝuinda estis la pionira entuziasmo kiu elfluis el la lokaj gesamideanoj. Krome, la fakto ke Tanzanio, havanta 125 tribajn lingvojn, sukcesis establi komunan lingvon, la svahilan, ja montras ke nenio estas malebla.

*Jesper Lykke Jacobsen (Danio),
kun informoj de Alan Iwi (Britio)*

La unua estis brandfaristo

En septembro ĉi-jara centjariĝos la esperantlingva teatro. Studanto de nia teatra arto, Zofia Banet-Fornalowa prezentas al ni la etoson kaj eventojn de la fora jaro 1896. Baldaŭ sekvos aliaj artikoloj pri la nuna farto de tiu arto.

La komedion *Unua brandfaristo* aŭ kiel diableto *meritis pecon da pano* verkis Lev Tolstoj en 1886. Ĝia intrigo enhavas nekaŝitan, akran socian kritikon: por ekvilibrigi la situacion en la infero, kie troviĝas ĉefe animoj de bienuloj kaj aristokratoj, ĉefdiablo sendas teren diableton por akiri animojn de kamparanoj, kaj tiu kontentigas sian ĉefon per alkohola degenerigo de antaŭe piaj kaj bonaj homoj. La kritikon komprenis sociaj agantoj i.a. laboristaj. Rezulte, pluraj amatoraj teatroj prezentis la komedieton. Tio tute ne plaĉis al la cara cenzuro, kiu malpermesis ludi ĝin, kaj nur post la oktobra revolucio (1917) oni povis reveni al ĝi.

La unua Esperanta prezento

La komedion *Unua brandfaristo*, laŭ la konsento de la aŭtoro, tradukis Esperanten A. K. Burenkov. Eldonis ĝin komence de 1896 la presejo de W. Tümmel en Nurenbergo. Ĝi aperis kiel n-ro 92 de *Biblioteko de la lingvo internacia*

Zamenhof pri E-teatro

La plej efika maniero de propagando estus, se oni povus aranĝi migrantan *teatran trupon* Esperantan (mi pensas, ke en Parizo estus tre facile trovi impresarion, kiu aranĝus tian trupon). Tia trupo, migrante tra ĉiuj plej gravaj urboj de Eŭropo kaj Ameriko kaj donante ĉie teatran prezentadon de iaj dramoj en Esperanto, aŭ almenaŭ dialogojn kaj kantojn en tiu ĉi lingvo, farus ĉie grandan bruon kaj alportus al nia afero riĉegajn fruktojn, ĉar nenia teoria parolado *pri* Esperanto povas tiel bonege efiki, kiel ludado de dramoj aŭ almenaŭ kantado *en* Esperanto. Ĉar tio ĉi estus io originala, la publiko ĉie volonte vizitus tian teatron kaj multe parolus pri ĝi, tiom pli se la komenco de prezentadoj estus farita en Parizo mem kaj la artikoloj en la Parizaj gazetoj antaŭpretigus la scivolecon de ĉiuj aliaj urboj de la mondo. Mi estas tute konvinkita, ke la enspezoj de tia trupo ĉie kun profito kovros ĉiujn elspezojn (tiom pli, ke la kaso de la trupo povus vendadi ankaŭ librojn esperantajn) kaj por nia afero tio estus la plej efika propagando.

(*Letero al Carlo Bourlet, 21 nov. 1903*)



Esperanto, estis 19-paĝa kaj kostis 50 centimojn. Post la apero oni tuj dissendis ĝin al la abonantoj de la Biblioteko. Hodiaŭ ĝi legeblas represita en *Ludovikologia dokumentaro VIII* (1993) de Ludovikito.

Kiam la Smolenska Esperanto-grupo, sub gvido de tre engaĝita, apenaŭ 20-jara, poldevena esperantisto Aleksandr Zakrjevski, decidis enscenigi la komedion de Tolstoj, la situacio ne estis favora por Esperanto. Ja antaŭ unu jaro, en 1895, la cara cenzuro malpermesis la eniron de *La Esperantisto* en la rusan imperion. Ankaŭ ne favora por Tolstoj, ĉar ĝuste pro la publikigo en *La Esperantisto* de lia verketo “Prudento aŭ kredo?” la cenzuro reagis. Tamen, la emo prezenti komedion de la granda Tolstoj, amiko de Esperanto, venkis la hezitojn. Eble la smolenskanoj ne estis plene konsciaj ke la cenzura malpermeso prezenti la teatraĵon ankaŭ en privata domo validas. La loka gazeto *Smolenskij Vjestnik* enhavas nenian mencion pri ĉi tiu okazintaĵo, kvankam pri aliaj Esperantaj aktivadoj oni skribis foje-foje favore. Feliĉe Zakrjevski, profesie privata instruisto, ne nur agis sur diversaj Esperanto-kampoj (fondo de librejo, katolika meso, reto de agentoj — prototipo de UEA-delegitoj —, distribuado de literaturo, senpaga instruado), sed estis ankaŭ homo skribema kaj atribuinta grandan rolon al la arto en la disvastigado de Esperanto. Danke al li ekestis en Smolensk arta trupo kaj horo. Per raportoj senditaj de li al *Lingvo Internacia*, eldonata en Upsalo, la unua Esperanta prezento estis eternigita. La raportoj de Zakrjevski liveras abundajn informojn ankaŭ pri la postaj teatraj prezentoj en Smolensk.



Supre:
Varsovia Teatro
de Pantomimo ludas
Maratono (Varsovia
UK, 1987).

Maldekstre:
Lernejo de Virinoj
de Moliero, Bulgara
E-Teatro (61-a UK,
Ateno, 1976).

La unua teatra vespero okazis en la hejmo de Zakrjevski mem. Jen konciza informo el *Lingvo Internacia* (n-ro 10-11, okt.-nov. 1896, p.196) pri tiu evento grava por la historio de nia teatro:

S-ro Zakrjevski (Rusujo, Smolensk, Officerskaja Sloboda) skribas al ni: “La 15^a/₂₇-an* de Septembro, dimanĉe, en mia hejmo estis aranĝita la esperanta spektaklo. Oni prezentis la komedion de L. N. Tolstoj: ‘Unua Brandfaristo’ en Esperanto. Antaŭ la komenco de la spektaklo la horo kantis nian himnon ‘La Espero’.

Apud la enira pordo oni disdonis senpage al ĉiuj miaj gastoj la propagandajn broŝurojn kaj la gramatikon de nia lingvo, ĉar multaj gastoj estis personoj, kiuj ne scias nian lingvon.

*T.e. la 27-an de septembro laŭ nia nuna, Gregoria kalendaro. La 15-a de sept. rilatas al la Julia kalendaro, tiam ankoraŭ valida en Rusio.

En la spektaklo partoprenis la sekvantaj personoj: A. Zakrjevski, I. Dembski, Pašic, fr-ino Sofia Jaceviĉ; fr-ino Višnevskaja kaj aliaj esperantistoj de nia urbo.

Kiom da engaĝiĝo, inventemo, laboro farita por ke la aranĝo alportu la atendatajn fruktojn, kaj kiel modesta priskribo fare de ties spirita animanto kaj ĉefludanto!

La spektaklo devis esti tre sukcesa, ĉar post nelonge en *Lingvo Internacia* (n-ro 1, jan. 1897, p. 4) troviĝas alia raporto pri sekvaj prezentadoj. La vespero de la 26-a de decembro 1896, ĉi-foje en la loĝejo de geedzoj Jaceviĉ, estis multe pli riĉa je artaj eventoj, ĉar antaŭ prezentado de fragmentoj el *La amo patra* de Goldoni (Zakrjevski citas la nomojn de ĉiuj rolantoj) kantis ĥoro sub la gvido de orgenisto Francisko Lipĉinski, kiu multe kontribuis al mesoj en Esperanto en la tiea katolika preĝejo. Post la prezento s-ino A. Jaceviĉ deklamis la rakonton en versoj *Nevola mortiginto* de Vasilij Devjatnin. La 13-an de januaro 1897, denove en la hejmo de Zakrjevski, okazis riĉa arta vespero: ripetiĝo de *La amo patra*, kanto de ĥoro, krome f-ino S. Višnevskaja deklamis versaĵojn el *Liro de esperantistoj* de Antoni Grabowski. Ambaŭ vesperojn komencis komuna kantado de “La Espero” kaj finis balo daŭranta ĝis la kvina matene.

La literatur-arta laboro daŭris en Smolensk ankaŭ post la translokiĝo de Zakrjevski al Arĥangelsk, kie li plu fervore aktivis. En n-ro 10 de *Lingvo Internacia* (okt. 1898, p. 149), oni legas korespondajon el *Smolenskij Vjestnik*, skribitan de la sekretario de la Smolenska grupo, mem filio de la Peterburga “Espero”, laŭ kiu la grupo decidis aranĝi “vicon de atingeblaj por ĉiuj literaturo-muzikaj vesperoj, je kiuj estos legataj la plej bonaj verkoj el la esperanta, rusa kaj internacia literaturo. La vesperoj estos aranĝataj en la loĝejo de la Smolenska Kredita Societo. Enirpago estos difinita tre modera, kaj libera mono iros al pligrandigo de rimedoj de la Filio.” Kaj plie: “La celo de la similaj vesperoj estos doni eblon al la smolenskanoj agrable kaj utile pasigi la tempon kaj ankaŭ konatiĝi kun la plej bonaj verkoj de la esperanta literaturo.”

Por bone kompreni la valoron de tio kion lanĉis la Smolenskaj esperantistoj, utilas rememorigi kion diras Petro Stojan en sia verko *Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto* (1953) pri la parola stato kaj nivelo de la lingvo en periodo eĉ iom pli posta ol estis lanĉita en Smolensk la teatra kaj literatur-populariga agado. Laŭ li (p. 69) en la unua Lingva Komitato (proponita de Zamenhof kaj starigita en 1905), kiu konsistis el 102 membroj, troviĝis nur 10 kiuj flue parolis la lingvon kaj povis libere esprimi siajn pensojn en Esperanto. Ĉi tiu fakto montras kiel grava estis tiam la disvastigado de viva Esperanto, instruado de ĝustaj prononco kaj akcentado — al kio elstare kontribuis la teatra arto per sia kapablo emocii.

Per mobilizo de ĉiuj fortoj oni devas omaĝi la pionirajn artistojn. Antaŭ 100 jaroj en Smolensk okazis la unua Esperanta spektaklo de socie kaj arte valora komedio de Tolstoj. Eble oni omaĝu la centjariĝon en 1996 per prezentado de la sama verko. Kiu ĝin surscenigos?

Zofia Banet-Fornalowa (Pollando)

Ĉi tiu artikolo unue aperis en Fonto 163, julio 1994, p. 31-33. La aŭtorino publikigis ankaŭ tri libretojn sub la titolo La Esperanto-teatro (entute 232 p., 33,90 gld. ĉe UEA).

Ĉu instruistoj interkompreniĝas?

Por ke termino estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia! Esploristo Mauro La Torre diagnozas terminologian kaoson en pedagogio kaj proponas elir-vojon.

Se Esperanto-parolanto diras al mi ke li estas *instruisto en mezgrada lernejo*, mi ŝatus tuj kompreni kun kiom aĝaj lernantoj li laboras, sendepende ĉu li estas hungaro aŭ italo, ĉu li supozeble konsideras la francan aŭ la usonan lernejo-sistemon. La saman interkomprenan bezonon aliaj esperantistoj sentas pri aliaj terminoj de la instruada temaro (*kolegio, seminario, licencio, diplomo, lekcio, prelego, doktoro, rektoro, pedagogo* ktp.) ofte uzataj en eksterfaka medio. Ne malplia konfuzo regas en la enfaka uzo de *metodologio, didaktiko, eduko, klerigo, scipovo, kapablo, kompetenteco*...

Ĉu ni certas, ekzemple, ke anoj de internacia ekzamen-komisiono el pluraj landoj kun diversaj lernejsistemoj kaj el malsamaj pedagogiaj skoloj uzus la samajn Esperantajn vortojn laŭ la samaj sencoj dum korektado kaj prijuĝado de taskoj? En tiel delikata laboro ili ja devus certe, precize kaj senĝene interkompreniĝi.

Terminajn dubojn havas ankaŭ verkantoj, tradukantoj kaj redaktantoj de artikoloj pri pedagogiaj temoj. Ankaŭ ĉar se oni volas paroli pri konkretaj lernejoj okazaĵoj kaj problemoj, ofte oni devas esprimi konceptojn kiuj estas nur lokaj aŭ kiuj en aliaj landoj

esprimiĝas per aliaj metaforoj. Ĉu ekzemple ekster Italujo oni komprenus la diferencon inter "plentempa" kaj "longtempa" lernejo? Preskaŭ ĉiumonate mi renkontas tiajn lingvajn demandojn, tradukante al Esperanto la artikol-resumojn de niaj du fakaj revuoj (*Cadmo* kaj *IAD*). Kompreneble, kiam temas pri novaj konceptoj — ekzemple pri instru-teknologioj —, similajn problemojn trafas eĉ tradukantoj al aliaj lingvoj; sed en la inter-

Eŭropa ILEI: montru vin!

La itala aktivulo Renato Corsetti apelacias al la "senlima fantazio de esperantistaj instruistoj" por krei eduk-projekton financeblan de Eŭropa Unio.

Ĉiu Esperanto-organizaĵoj havas grandan intereson pri tio ke ĉiuj aliaj E-organizaĵoj estu fortaj, grandaj, bone organizitaj kaj efike laborantaj. Se ILEI, ekzemple, sukcesus akiri pli da membroj ol UEA, UEA povus nur gajni el tio, ĉar tiuj homoj ĉiukaze aĉetus librojn, partoprenus kongresojn ktp.

Pro tio ne ŝajnu stranga la fakto ke mi utiligas la revuon de UEA por mesaĝo kiu fakte celas esperantistajn instruistojn en la landoj de Eŭropa Unio. Kial mi volas atingi EU-instruistojn? Nur por diri al ili ke la komisiono de Eŭropa Unio en Bruselo lanĉis novan plurjaran programon, SOCRATES, kiu celas subvencii lernejojn kaj lernoinstancojn ĉiunivelajn kiuj agas en la kampoj de lingvo-instruado, interkultura instruado, malĉea instruado ktp.

Ĉi tiu programo subvencias divers-specajn agadojn, se ili estas farataj

kunlabore kun similaj instru-instancoj en aliaj EU-landoj.

Kiam temas pri lingvoj, nur la oficialaj lingvoj de la 15 landoj estas financeblaj; programoj kiuj celas instrui nur Esperanton ne ricevas subtenon. Aliflanke, almenaŭ laŭvorte, EU preferas programojn kiuj enplektas malpli parolatajn lingvojn. Pri tio esperantistoj ja interesiĝas, kaj per Esperanto ili povas kontakti senprobleme siajn kolegojn de Svedujo ĝis Portugalujo — prezentiĝas do multaj ebloj por pensi pri financeblaj projektoj tiurilataj.

Principe same financebla estas kunlaboro inter diverslandaj lernejoj por produkti komunan historian tekston por infanoj de difinita aĝ-nivelo.

Mi ne asertas ke estas facile inventi financeblan projekton, sed mi certas ke la fantazio de esperantistaj instruistoj en ĉi tiu kampo estas senlima.

Mi agnoskas ke mi prezentas al vi ion minimuman. Mi ne petas vin konvinki la prezidanton de Eŭropa Parlamento deklari ke Esperanto estas bela. Mi ne petas vin konvinki la eŭropajn oficistojn lerni kaj ekuzi E-on nun. Mi petas vin nur fari malgrandajn praktikajn laborojn por Eŭropo



En la Lernejo de Sano en Palanga (Litovio, ekster EU) E-instruistoj ne hezitas montri sin — en la tago de la unua neĝo.

per E-o. Tiamaniere oni ekvidos ke esperantistoj ekzistas kaj aktivas.

Tiucele, krom lernejoj en kiuj deĵoras esperantistaj instruistoj, ankaŭ landaj ILEI-sekcioj — organizitaj minimume kun statuto kaj sidejo — povus prezenti petojn pri financado de difinitaj agadoj.

Iam eble, laŭ la iniciato de Eŭropa Esperanto-Unio, oni sukcesos aprobigi projekton ankaŭ pri Esperanto mem. Sed ankaŭ tio povos sukcesi nur kiam en EU-landoj ekzistos esperantistaj instruistoj kiuj povos konvinki kelkajn klasojn partopreni la eksperimenton.

Do, se vi estas aktiva instruisto, trovu la vojon al la ILEI-sekcio en via

Unu el la plej interesaj! Abonu NUN al

EVENTOJ

Petu senpagan provnumeron:
pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario.

naci-lingva komunumo la manko (aŭ malabundo) de daŭraj instruaj sistemoj kaj tradicioj iom pli akriĝas la kompren-malfacilojn.

Elkoncepte kaj elvorte

Se oni volas iel ordigi ĉi tiun lingvan kampon, celante pli klaran kaj racian terminaron, tamen kiom eble koheran kun la tradicio, oni povas sekvi du vojojn inter si reciprokajn.

1) *Elkoncepta* vojo: oni "desegnas" la reton de konceptoj kiuj konsistigas la skeleton de la pedagogia kampo, kun ĝiaj enaj kaj eksteraj semantikaj rilatoj. Oni klopodas iel difini tiujn konceptojn kaj esprimi ilin en pluraj

lingvoj, inter kiuj E-o; se por iu koncepto ankoraŭ ne ekzistas E-termino, oni proponu iun, konsiderante kiom eble multajn nacilingvajn tradukojn.

2) *Elvorta* vojo: oni esploras pri la efektiva uzado en la pri-instrua kampo, traktante la jarkolektojn de *Internacia Pedagogia Revuo*, la malmultajn instru-sciencajn librojn, la metodikajn partojn de lernolibroj, la tekstojn de la pri-instruaj prelegoj ktp. El la rezultintaj vortlistoj, ligitaj al la deven-kuntekstoj, oni povos iom post iom konstrui termin-bankon, kie la terminoj aperu kun siaj difinoj, uzekzemploj kaj nacilingvaj tradukoj.

Ambaŭ vojoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Kompreneble, temas pri granda laboro, ne plenumbla de unu homo. Male, ĝi postulas organizon de pluraj homoj kun taŭgaj metodoj kaj iloj, kiuj agu laŭ klara plano. Konsidere la konate malabundajn fortojn je nia dispo, la plano estu realisme limigita kaj laŭgrada.

Tian terminaran laboradon evidente povas helpi komputilaj rimedoj kaj teksto-statistikaj metodoj. Sed la teknologio progresis pli rapide ol niaj kulturaj kompetentoj. Ĉu tamen troviĝos en Esperantujo taŭga grupeto da kapablaj kaj laborpretaj interesitoj?

Mauro La Torre, komisiito de ILEI por terminologio

*Terza Università di Roma
Via del Castro Pretorio, 20
IT-00185 Roma, Italio
faks. +39/6/445-26-42*

retpoŝto: m.latorre@educ.uniroma3.it

E-kurso ĉe ŝtata universitato

La Universitato por Fremduloj en Sieno decidis starigi korespondan kurson pri Esperanto (ĉefe) por instruistoj en italaj lernejoj ĉiu-nivelaj.

Ĉi tiu universitato okupiĝas pri instruado de la itala lingvo kaj aparte pri esploroj rilate al lingvo-instruaj metodoj. Ĝia decido starigi E-kurson estas kunligebla unuflanke kun la ministeria cirkulero pri Esperanto (jun., p. 105) kaj duaflanke kun la ekesto de Esperanto-sekcio de la prestiĝa ANILS, asocio en kiu membras instruistoj de fremdaj lingvoj en italaj lernejoj.

Temas pri normala universitata korespondanta kurso, al kiu ĉiu rajtas enskribiĝi kontraŭ kotizo de 250 mil liroj. La atesto pri plenumo de la kurso validas por akiri poentojn por la instruistaj rango-listoj kutimaj en Italio (*graduatorie*). Se estos sufiĉe da dezirantoj, oni povos aranĝi fine de la kurso ankaŭ ĉeestan ekzamenon, kiu rajtigos je la unua-grada diplomo de Itala Instituto de Esperanto. La sciencan nivelon aparte garantias kunlaboro kun la interlingvistika katedro de Universitato de Torino. Informoj ĉe la Esperanto-sekcio de ANILS: Via degli Orti Variani 33, IT-00182 Roma, Italio. ★



Foto: Kastytis Aleknavičius

lando, poste klopodu starigi ĝin iom pli firme, kaj intertempe elserĉu la vialandan agentejon kiu prizorgas la SOCRATES-programon. De tiu vi povas ricevi la "instrukciojn" por prezenti projektojn. Legante ilin vi certe trovos iun punkton kiu tiklos vian fantazion. Tiam kontaktu aliajn esperantistajn instruistojn en aliaj EU-landoj kaj konvinku ilin kunprojekti ktp ktp.

Kompreneble neniu malhelpos vin fanfaroni poste al neesperantistoj (ne al la eŭropaj instancoj) ke vi estas realiganta eŭropan projekton financatan de Bruselo, en kiu estas ankaŭ Esperanto. Tio povas utili ankaŭ por trovi kursanojn por la kurso aranĝata de via loka klubo.

Renato Corsetti (Italio)

ZEO-j: persvadu aŭtoritatojn

Multaj UEA-membroj kaj Esperanto-kluboj ricevis lastatempe leteron de Tangshan Esperanto-Asocio (Ĉinio). La Tangshan-anoj planas starigi grandiozan Zamenhof-monumenton kaj petas financan subtenon por tio.

La kuraĝo de la Tangshan-aj samideanoj certe meritas laŭdon. Sed estas tre dubinde ĉu nia movado uzu sian kapitalon por tiel enorma projekto. Estus pli saĝe unue proponi al la lokaj aŭtoritatoj ke ili financu la monumenton por tiel krei turisman allogaĵon. Dum mankas certeco pri publika financado, UEA malkonsilas donaci monon por la projekto.

Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEO-j) estas ja grava formo de rekono al la Esperanto-movado, se temas ekz. pri stratoj aŭ placoj kies nomon decidis urbo aŭ alia publika instanco. Kutime la sola investo postulata estas tempo kaj iniciatemo por persvadi la decidfarajn aŭtoritatojn. UEA daŭre instigas al tia agado, kiu jam rezultigis pli ol 1 000 ZEO-jn tra la mondo. (Baldaŭ aperos ĉe UEA ilustrita katalogo de ili, kompilita de Hugo Röllinger.)

Osmo Buller

Ĝenerala Direktoro de UEA

KOTIZTABELO DE UEA POR 1996

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	8	20	50	30	20	100
Aŭstralio/dolaro	12	31	78	47	31	156
Aŭstrio/ŝilingo	100	245	610	365	245	1220
Belgio/franko	290	720	1800	1145	765	3600
Brazilo/guldeno	8	20	50	30	20	100
Britio/pundo	6	15	38	24	16	76
Bulgario/guldeno	8	20	50	30	20	100
Ĉeĥio/krono	135	340	850	510	340	1700
Danio/krono	55	140	350	225	150	700
Finnlando/marko	45	110	270	170	115	540
Francio/franko	50	120	300	190	125	600
Germanio/marko	14	35	87	55	37	174
Greklando/drakmo	1400	3600	9000	5700	3800	18 000
Hispanio/peseto	850	2100	5300	3400	2300	10 600
Hungario/forinto	650	1600	4000	2400	1600	8000
Irlando/pundo	6	14	35	22	15	70
Islando/guldeno	16	39	97	58	39	194
Israelo/guldeno	13	32	80	48	32	160
Italio/liro	13 000	32 000	80 000	51 000	34 000	160 000
Japanio/eno	1150	2880	7200	4320	2880	14 400
Kanado/dolaro	12	31	78	47	31	156
Korea Resp./guldeno	12	31	77	46	31	154
Nederlando/guldeno	16	39	97	61	41	194
Norvegio/krono	60	150	380	230	150	760
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	38	190
Pollando/guldeno	8	20	50	30	20	100
Portugalia/eskudo	1000	2400	6000	3800	2500	12 000
Rusio/guldeno	8	20	50	30	20	100
Slovakio/krono	150	380	950	570	380	1900
Sud-Afriko/guldeno	14	35	88	53	35	176
Svedio/krono	70	170	430	275	185	860
Svislando/franko	12	31	77	46	31	154
Usono/dolaro	9	23	58	35	23	116
TARIFO A/guldeno	10	26	64	38	25	128
TARIFO B/guldeno	8	20	50	30	20	100

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

INSTRUADO

"Italanto"

Daŭras la serio de la seminarioj organizataj de la Roma katedro de Itala Esperanto-Instituto (precipe de Michela Lipari kaj Renato Corsetti).

Post la unua seminario aranĝita en Bolsena pasintan majon, pri "Instruado de Esperanto: materialoj kaj metodoj", de la 8-a ĝis la 10-a de decembro okazis en Asizo la seminario "Italanto: kompara analizo inter la itala kaj Esperanto".

Fabrizio Pagliaroli komparis la fonologiajn sistemojn de la itala kaj E-o, dum Mauro La Torre prelegis pri la vortfaradaj reguloj en la du lingvoj. Renato Corsetti klarigis la psikologiajn meĥanismojn de lingvolernado. Anna Löwenstein, kiel elektera observanto de la italaj esperantistoj, atentigis pri la plej oftaj eraroj kaŭzitaj de itallingvaj kutimoj. Lingvistike interesa kaj samtempe tre amuza estis la prelego de Antonio De Salvo pri la esperantigo de italaj dirmanieroj.

Tiaj seminarioj, kvankam adresataj precipe al instruistoj de Esperanto, ĉiam kolektas pli ĝeneralan publikon de homoj kiuj deziras profundigi siajn konojn pri la internacia lingvo. Krome, duona tago de la seminario estis dediĉita al la pli ĝenerala temo de la E-instruado en la italaj lernejoj kaj, por ebligi la partoprenon de instruistoj neesperantistaj, la prelegoj estis itallingvaj. Mauro La Torre parolis pri ĵus ekinata didaktika eksperimento, kiu celas pristudi kiel la lernado de Esperanto en mezgrada lernejo efikas sur la kapablojn de la lernantoj kompreni la enajn strukturojn de sia gepatra lingvo (vd. dec., p. 217). La prelego de Giordano Formizzi, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, temis pri la novaj perspektivoj malfermitaj en Italio de la favora sinteno de la edukministerio (jun., p. 105). Fine, Aldo Grassini prelegis pri didaktiko por blinduloj, ne nur rilate al la instruado de la internacia lingvo.

La tekstoj de ambaŭ seminarioj estas mendeblaj ĉe CoEdEs, via Villaresi 38, IT-20143 Milano, Italio.

Gabriel Aquilina (Italio)


Bona bazo por plena enlingviĝo

Kunvojaĝu. Paul Gubbins. Pisa: Edistudio/ILEI, 1993. 239p. 22cm. Bind. 30,00 gld.

Temas pri internacia, pri sennacia lernolibro, sen klarigoj en ajna nacia lingvo. Unue menciindas la tre klara kaj alloga grafika aspekto de la libro. Due, la amaso da tre utilaj ekzercoj, same skribaj kiel paroligaj, por plena aktivigo de la lernita materialo (estus des pli bone se oni povus trovi la solvojn librofine). Trie, fortan aplaŭdon meritas la legaĵoj, kiel “El la agendo de s-ro Braŭn”, diversaj leteroj, veterprognozo, vivresumo, mendilo, aliĝilo, recenzo pri kasedo de la rokgrupo Persone, kuirrecepto, turismaj informoj pri Antverpeno aŭ informa teksto pri Amnestio Internacia.

Komencas ĉiun ĉapitron dialogo aŭ konversacio, kie jam prezentiĝas la traktota temo. Ofte aperas aktualaj problemoj, ekologiaj,

sociaj aŭ politikaj. Sekve aktualas ankaŭ multaj vortoj, kiel *tekst-redaktilo* (p. 9), *acida*



Ne pensu ke Kunvojaĝu de Gubbins instruas nur pri vetero kaj cetero.

pluvo (p.197), *forcejo-efiko* (p.168), *fridujo* (p.175) aŭ *perestrojko* (p.

184). La lastaj kvin ĉapitroj ne plu enkondukas gramatikerojn, sed invitas al pli profunda esplorado de la lingvo.

Mi apenaŭ trovis dubajn punktojn. Mi dubas pri la uzado en lernolibro de la vorto *komputoro* (anst. *komputilo*, pli simpla kaj facila, kaj pli uzata) aŭ de *alies* sen ajna klarigo. Temas ne pri beletro, sed pri lernilo, kaj jen tial mi aplaŭdas la uzadon de la fundamenta *-ujo* por landnomoj (antiujistoj ne grumblu: *-io* debutas sur p. 181). Vere ĝenis min nur la manko de la ofttega verbo *farti*, cenzurita probable tial ke al anglaj oreloj ĝi pensigas pri furzado.

Finas la libron du interesaj aldonoj: “Gramatiko — Superrigardo” (referenco al la apartaj ĉapitroj) kaj “Enkonduko de novaj eroj per Esperanto”. Nu, kvankam mi ne provis uzi ĝin en kurso, mi certas ke persono atinginta la finon de *Kunvojaĝu* nepre havos bonegan bazon por plena enlingviĝo. **Georgo Kamaĉo (Hispanio/Belgio)**

Du kunligiloj de teorio kaj praktiko

Metodiko de la Esperanto-instruado. Gvidilo por instruantoj de la lingvo internacia. Rudolf Rakuša. Rotterdam: UEA, 1991 (3-a eld.). 189p. 20cm. 15,00 gld.

Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado. Irena Szanser. Budapeŝto: ILEI, 1992. 170p. 22cm. Bind. 24,00 gld.

Por bonkvalitaj Esperanto-kursoj necesas ne nur bonaj lernolibroj, sed ankaŭ primetodikaj scioj de la instruantoj. Tial la apero de du libroj pri lingvo-instruado, de konataj spertuloj, estas salutinda.

La libro de Rakuša koncentriĝas al regulaj lingvokursoj en lernejoj, sed ĝi riĉas je konsiloj por instruantoj de Esperanto en plej diversaj kondiĉoj. La temoj etendiĝas de ĉefe teoriaj traktadoj pri la evoluo de la fremdlingva metodiko ĝis ege praktikaj provlecionoj, ekz. pri la enkonduko de la akuzativo. Plaĉis al mi la indikoj pri la inkludo de beletraĵoj kaj popular-sciencia literaturo en instruprogramoj kaj la rekomendoj kiel Esperanto-instruado konduku al kolegoj pri aliaj lingvoj (p. 15). La grava

malavantaĝo de tiu ĉi libro: temas pri represaĵo de la dua eldono el 1970.

Harmonian kunligon inter teorio kaj praktiko de lingvoinstruado celas ankaŭ la libro de Szanser, kiu — laŭ la kovrila teksto — volas “prepari kaj plueduki E-instruistojn kaj rilatas al la instruprogramo de UEA kaj ILEI por instruarjtagaj kursoj”. Laŭ mi ĝi havas pli la karakteron de resuma konsultlibro (kvankam indekso bedaŭrinde mankas). La aŭtorino subdividas la libron en tri ĉapitrojn: I. Ĝenerala lingvistika kaj metodologia enkonduko; II. Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado; III. Elektitaj problemoj de psikologio. Ĉe tia postulema tagordo, traktado de la diversaj temoj ne povas esti profunda.

Ĝi ofte limiĝas je elnombrado de faktoj aŭ je kunligado de nomoj de konataj sciencistoj (ekz. p. 11), kun indikoj pri aldona fakliteraturo (ĉefe pollingva). Rilate tiun la aŭtorino bedaŭrinde ne montras la ekzaktecon necesan en scienca verko. Fine de la libro ni trovas diversajn desegnaĵojn sen komento: ĉu skizo de neŭrono (eĉ dufoje, p. 130 kaj 163) vere interesos E-instruantojn?

Kompreneble la libro enhavas ankaŭ partojn kiuj rilatas al la “praktiko” laŭ la titolo: i.a. pri ekzercotipoj (p. 111-120) kaj pri didaktikaj kantoj kaj versoj (p. 64-77). Kiel ĉefan meriton de la aŭtorino, tamen, mi rigardas ties terminologiajn klopodojn. Szanser liveras multajn fakesprimojn kun difinoj kiuj povus prezenti elirpunkton por terminologia pluevoluigo.

Ambaŭ verkoj havas fortajn kaj malfortajn flankojn. Mi bedaŭras ke aktualaj temoj, kiel ekz. interkultura komunikado kaj ĉi-rilataj postuloj al lingvo-instruado, estas tuŝataj en neniuj el la du libroj.

Sabine Fiedler (Germanio)

AIS, UEA: paŝoj al kunlaboro

Post la unua komuna stud-sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj de Internacia Kongresa Universitato en la Tampere UK, UEA kaj AIS interkonsentis lanĉi komunan alvokon.

Dum la Universala Kongreso en Tampere unuafoje realiĝis la ideo de komuna stud-sesio de AIS kaj Internacia Kongresa Universitato. Tiu kunlaboro inter UEA kaj AIS daŭros: en la venonta kongreso en

aliĝu al AIS kaj, aliflanke, ke ĉiuj AIS-anoj kiuj ankoraŭ ne aktivas en la movado, informiĝu pri UEA kaj membriĝu en ĝi.

Por realigi la celon ke Esperanto penetru en la sciencon medion kiel



Senatanoj de AIS dum malfermo de stud-sesio

Prago denove okazos studsesio de AIS lige al Internacia Kongresa Universitato.

Alia paŝo en la direkto de kunlaboro estis farita kiam UEA uzis siajn lastatempajn kontaktojn ĉe Unesko kaj kun scienc-rilataj internaciaj ne-registaraj organizoj (NRO-j) por informi pri AIS kaj instigi reciprokajn kontaktojn inter AIS kaj tiuj NRO-j. En la senatkunsido de AIS estis decidite plu trakti tiujn kontaktojn.

Laboro bone kunordigita inter UEA kaj AIS povos doni al la internacia lingvo la ŝancon penetri en la sciencon medion internacie, kiel laborlingvo en sciencaj renkontiĝoj kaj publikigaĵoj. Por atingi tion, estas bezonate atingi kiel eble plej multe da personoj ligitaj al scienco (sciencistoj, studentoj, profesuloj) kiuj havas iun konon de Esperanto aŭ eĉ simpatias ĝin. UEA kunligas milojn da esperantistoj el la tuta mondo. Al AIS apartenas centoj da altreputaciaj sciencistoj. Estus utile ke pli da scienc-rilataj membroj de UEA

laborlingvo en sciencaj renkontiĝoj, esperantistoj kun ligo al scienco kaj iliaj simpatiantoj devas subteni (per aliĝo aŭ eĉ prelego) internaciajn renkontiĝojn kiuj uzas plurajn laborlingvojn, kaj iniciati la akcepton de Esperanto kiel unu el tiuj lingvoj. Simile, ili subtenu (per biblioteka mendigo, propra mendo, kaj eĉ kontribuo) publikigaĵojn kiuj pretas uzi plurajn lingvojn, kaj kontribuu al ili per artikoloj en Esperanto aŭ kun resumo Esperanta.

Por konkretigi tiujn ideojn, ni serĉas informojn pri tiaj plurlingvaj sciencaj organizoj, konferencoj kaj periodaĵoj (speciale tiuj kiuj jam uzis Esperanton aŭ simpatias al ĝi). Dum la UK en Prago ni esperas starigi konkretan agadplanon.

*Prof. Amri Wandel
Estrarano de UEA
pri faka kaj scienca agado
Prof. Hans Michael Maitzen
Senatano de AIS
respondeca pri rilatoj kun UEA*

AIS dekjara

Pasintjare Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino povis festi sian dekjaran oficialan ekziston. En 1985, post dujaraj preparaj laboroj fare de internacilingvaj sciencistoj, la tiama ministrino d-rino Fausta Morganti oficialigis la fondon de AIS-San-Marino, surbaze de la San-Marina kadroleĝo pri universitata instruado.

Ene de dek sume sukcesaj jaroj, AIS gajnis oficialan agnoskon en Rumanio, Pollando kaj Ĉeĥio, kaj okazigis en tiuj landoj studkonferencojn kun universitatnivelaĵoj kursoj, prelegoj kaj studfinaj ekzamenoj. Ne nur sciencistoj tie per "adapta adopto" agnoskis sian akademian gradon per AIS, sed ankaŭ studentoj akiris tiajn gradojn originale de AIS, studante plejparte en aliaj universitatoj sub gvido de AIS-anoj kaj ekzamenate dum AIS-konferencoj.

AIS povis voki ĉ. 250 sciencistojn el pli ol 50 landoj por honorofica kunlaborado en la scienca sektoro. Kvindek da ili estas kiel "ordaj profesoroj" plenrajtaj membroj de AIS. Krom la scienca sektoro ekzistas arta kaj teknika sektoroj, kaj la subtena sektoro, kies membroj provizas la akademion per la necesa mono por la administraj kostoj.

La Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS estas komunumo de internacilingvaj sciencistoj kaj formas la personan bazon por la laboro de AIS, kiu el ISK vokas siajn sciencajn membrojn kaj kunlaborantojn. La 1-an de oktobro 1995, ISK akceptis la 1000-an aliĝon. La nova ISK-ano estas d-ro Winfried D. Parkinson el Aŭstralio, kiu laboras en la kampo de geofiziko.

En 1996 AIS planas okazigi tri studkonferencojn: en Nitra (Slovakio), en San-Marino, kaj en Prago (Ĉeĥio), proksimume samtempe kun la Universala Kongreso de Esperanto. Dum tiu ĉi konferenco, interalie la Nobel-premiita AIS-ano Reinhard Selten prezentos kurson.

Informas kaj aliĝpetojn akceptas: Scienca Sekretariejo, Kleinenberger Weg 16 B, DE-33100 Paderborn, Germanio. AIS informas pri si en Internet ĉe: <http://www.uni-paderborn.de/extern/fb/2/AIS/ais.html>.

Reinhard Fössmeier (Germanio)

Interkulturaj emocioj, spertoj kaj scioj

La asocio Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo realigis fine de la jaro 1995 en Germanio erojn el du el siaj konstantaj projektoj.


Komence de novembro okazis la dua Kontraŭrasisma Seminario (Esperanto-Junularo Berlin-Brandenburgio transprenis la tutan organizan flankon), kaj krome finfine aperis la unua volumeto de “Vivprotokoloj” (eldonita en kunlaboro kun Berlina kulturasocio).

Multaj jam scias ke Monda Kunagado celas roli kiel esperantista Unesko-asocio, do aktivigi esperantistojn en edukaj, kulturaj kaj sciencaj kampoj. Por realigi tiun celon ĝi serĉas daŭre novajn kunlaborantojn, homojn kun propraj ideoj kiuj serĉas taŭgan kadron por realigi ilin, kaj krome kunagumulojn por la ekzistantaj projektoj. (Cetere ĝi urĝe serĉas ankaŭ volontulon por administraj laboroj; interesitoj turnu sin al la aŭtoro.)

La seminario kontraŭ rasismo (pli klare oni devus diri ke ĝi celis emociojn kaj agojn kontraŭ aliaj kulturoj) okazis sen iu ajn prelego, en la ĉaskastelo de Glienicke apud Berlino. En ĝi partoprenis krom germanoj ankaŭ poloj, usonanino, italino. Kontraste al la unua antaŭ du jaroj (vd. '94 marto, p. 47), ĝi okazis en Esperanto kaj sub gvidado de la esperantistinoj Elisabeth Schwarzer kaj Encarna Teruel Rodríguez. Helpe de rolludoj, reciprokaj intervjuoj, rakontitaj spertoj, komunaj diskutoj kaj celita uzado de kliŝoj, la partoprenantoj venis al la ĉefaj konkludoj, ne malkonataj al

esperantistoj: ke toleremo venas el spertoj kun la diferencaj kulturoj; ke ĝi ne ĉiukaze povas solvi ĉiujn sociajn aŭ interkulturajn problemojn; ke kliŝoj pri io aŭ iu ja estas danĝeraj, sed ne nepre devas esti tuj aŭ ĉiukaze negativaj; kaj ke fakte ĉiu iel apartenas al iu minoritato, ĉu kultura aŭ lingva, ĉu socia, ĉu eduka, ĉu statura

el diversaj mondopartoj. Zdravka Metz el Kanado kaj Ulrich Becker el Germanio kiel ĉefaj motoroj de la projekto intervjuis 13 esperantistojn el kvar kontinentoj kaj de entute 11 naciecoj. Manke de aliaj kunlaborantoj, ili decidis publikigi la ĝisnunajn rakontojn, por montri kion ili celis kaj por tiel krei emon en multaj homoj



Kursanoj de Chhim Sokha en Kamboĝo. Kiom el ili menciis Esperanton en “vivprotokolo” post 50 jaroj?

aŭ korpestetika, religia, seksa ktp. La avantaĝo de tiu ĉi sukcesa seminario konsistis ĉefe en tio ke la rezultoj ne estis science instruataj, sed emocie travivataj kaj spertataj.

Alia projekto de Monda Kunagado nun prezentas unuan rezulton. Antaŭ kelkaj jaroj lanĉiĝis la ideo kolekti rakontojn el la vivoj de esperantistoj

ekkunlaborien la projekto. La “Vivprotokoloj” ne estas “protokoloj” (tiu nomo restis el la unua ideo), sed tekstoj en kiuj homoj rakontas pri sia propra vivo, kun la propra lingvaĵo kaj propre metitaj akcentoj. La intervjuoj celas konsciigi pri la diverseco de la vivoj, vivoceloj, ebloj kaj aspiroj ankaŭ inter la esperantistoj, tiel kreskigi la interkomprenon kaj la sentojn de reciprokaj respekto, toleremo kaj solidaro. Por doni al tiu ĉi celo pli da efiko, necesas pli da “vivprotokoloj”. Do se vi volas kontribui (kaj se vi volas scii kiel fari tion), aĉetu la libreton (90p, baldaŭ ĉe la Libroservo de UEA). En ĝi vi trovos apud la tekstoj kelkajn metodikajn klarigojn.

Esperantio ja havas sian historiografion — tiun pri la grandaj historiaj eventoj, la grandaj personoj kaj la grandaj kulturaj atingoj. Ni komune aldonu tiun de la ĉiutaga vivo en nia diasporo.

Ulrich Becker

*Neue Bahnhofstr. 18
DE-10245 Berlin, Germanio*

Informfolioj en ĉiuj EU-lingvoj

La plimulto de la homoj aŭ nenion scias aŭ estas misinformitaj pri Esperanto. Por sisteme rebati iliajn antaŭjuĝojn, tamen plej ofte mankas taŭgaj informiloj donaceblaj aŭ sendeblaj al tiuj kiuj petas informojn aŭ publike esprimas neveraĵojn.

Tial la ĵus forpasinta Edward Symoens (vd. p. 40) lanĉis la ideon eldoni serion da unu- aŭ du-paĝaj informfolioj kiuj traktas diversajn aspektojn de la Esperanto-realaĵo (scienco, literaturo, komerco, edukado, interlingvistiko ktp). La folioj baldaŭ ekaperos ĉe Flandra E-Ligo (FEL) en alloga prezento, en Esperanto kaj la nederlanda. Sed la fina celo estas disponigi tiajn foliojn en ĉiuj lingvoj de Eŭropa Unio. Por tio FEL (Frankrijk 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio; ☎ +32/3/234-34-00; ✉ 233-54-33; ✉ fel@eunet.be) bezonas skipon da kapabluloj kiuj povus traduki la 12 ekzistantajn (kaj novajn) tekstojn en sian lingvon aŭ mem aldoni tekston pri interesa temo.

Federacioj kaj landaj asocioj mendu grandan kvanton de la informiloj! La folioj kostas po 3 belgajn frankojn, kun minimuma pago de 100 BEF.

Nova estraro frontas dilemojn de moderno

Estas en la intereso de nia tuta komunumo ke ĝia plej grava lingva institucio, la Akademio de Esperanto, vigle funkciu kaj tenu vivan kontakton kun la esperantistaro. Kion ni atendu post la ĵusaj estraraj elektoj? Respondas la kvar elektitoj.

La Akademio de Esperanto parte renoviĝas en ĉiu tria jaro: unue (re)elektiĝas triono de ĝiaj principe 45 membroj, poste la estraro, plus la direktoroj de ĝiaj sekcioj kaj komisionoj. Ni jam raportis (jul.-aŭg., p. 138) pri la novaj membroj; nun, laŭ komuniko de la ĝisnuna prezidinto,

d-ro André Albault, ni povas informi pri la estraraj elektoj.

La 30-an de novembro kunvenis en Tuluzo la balot-komisiono de la Akademio, en ĉeesto de d-ro Albault. Rezulte de la alvenintaj 32 balotiloj, kiel prezidanto elektiĝis d-ro Werner Bormann (18 voĉoj), preter prof. Mi-

chel Duc Goninaz (13 voĉoj). Sekretario-kasisto fariĝis Perla Ari-Martinelli (18 voĉoj), dum Reinhard Hauptenthal ricevis 12 voĉojn. Elektiĝis du vicprezidantoj: Gerrit Berveling (24 voĉoj) kaj Gonçalo Neves (21 voĉoj).

Kvankam la nova prezidanto, d-ro Werner Bormann, neniel estas novulo —

D-ro Werner Bormann, prezidanto



Dr. Werner Bormann (1931) komencis sian Esperanto-vivon en Germana E-Junularo en 1949 kaj nun estas Honora Membro de Germana E-Asocio kaj de UEA. Profesie li laboris en la ekonomio. De post 1963 li lektias en universitatoj (ankaŭ pri Esperanto).

(1) La Akademio havas sian kontinuan taskon: konsili pri la lingvouzo. Tion ĝi transprenis de d-ro Zamenhof en 1905, kaj tio estas daŭre grava. Ankaŭ nun ni prilaboras lingvajn demandojn por respondi al ŝanceliĝantoj, kaj dum la UK en Prago denove okazos tia publika diskuto.

Detalajn demandojn pritraktas unuopaj akademianoj, kio daŭre okazas, aŭ — se la afero estas esenca — la Akademio kiel tuto, en sia tempo-konsuma proceduro. Apud tio staras la principaj problemoj. La Akademio studas ĉion laŭ la preskriboj en sia statuto, kiu ankaŭ diktas al ĝi en artikolo 1 kiel ĝian celon: “konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto”. Jen la plej grava tasko de la Akademio.

Principaj problemoj leviĝis lastatempe en antaŭe ne konata akreco. La ĉirkaŭo de la moderna homo estas plena de ĉiam novaj iloj kaj fenomenoj. Apenaŭ ni lernis la amason da nocioj de la aŭto, tiam jam venis la sendrata telefono kun centoj da novaj nomendaj elementoj. En mia fako, ekonomio, kreiĝas ĉiumonate multaj terminoj, ĝenerale en Usono, en ties

lingvo. Por Esperanto jen montriĝas la dilemo: ĝi restu facile lernebla — ĝia granda avantaĝo! — kaj ĝi estu tamen plene esprimkapabla. Ni devos trovi en interkonsento ireblan vojon.

Dua eco de Esperanto bezonas flegadon: ĝia (relativa) neŭtraleco. La 15-a regulo pri la akcepto de fremd-vortoj, kvankam ne malhavebla, facile fariĝas invadejo por novaj eŭropaj vortoj. Sed Esperanto ne estas naturalisma planlingvo, kaj ĝi ne evoluitien. Ĝia karaktero de skemeca (aŭtonoma) planlingvo disponigas apenaŭ elĉerpeblan potencialon por komunikado. Ankaŭ ĉi-kampe ekvilibro necesas inter la distrebantaj tendencoj.

La diskuto pri tiaj principaj demandoj nun plivigliĝis. La Akademio aranĝis en 1994 kolokvon pri la stato kaj estonteco de Esperanto (sept. '94, p. 157; pri mia kontribuaĵo vidu jun. '94, p. 106). La Komitato de UEA kreis dum la UK de 1995 “konstantan komisionon pri lingvopolitiko”. Do kiam nun la lingvopolitiko estas ĝenerala temo, en tiuj laboroj partopreni estas grava tasko por la Akademio.

(2) Nun, kiel prezidanto, mi plenumos la deklarojn el mia balotprezento. Mi klopodos pri novaj impulsoj kaj freŝa etoso. Ankaŭ necesas la prizorgado de la organiza stabileco. La decidvojoj devos glate funkcii.

Profesie mia laborkampo estas la ekonomio. En la universitato mi lektias pri interlingvistiko kaj Esperanto. Ambaŭ fakoj ligiĝas en la faklingvo de Esperanto. Tie troviĝas mia persona engaĝiĝo. Mi plue laboros kaj verkos pri tiuj temoj.

Perla Martinelli, sekretario

Perla Martinelli (edzino de Giorgio Silfer) naskiĝis en Italio kaj loĝas en Svislando. Tradukisto kaj lingvoinstruisto, ŝi nun aktivas kiel arta direktoro ĉe LF-koop, kies revuon Literatura Foiro



ŝi ĉefredaktis dum 16 jaroj. Kunfondintino de La Kvinpetalo kaj de la E-Centro en PEN-klubo Internacia, de 1994 ŝi prezidas Svisan E-Societon.

(1) Por konkrete respondi vian demandon, mi listigos prioritatojn kiujn mi studis speciale kun prof. Michel Duc Goninaz:

— La Akademio devas akiri juran personecon, kio faciligos ĝian vivon en kaj ekster Esperantio (ni pensu ekzemple pri la rilatoj kun publikaj instancoj kaze de ia oficialigo de nia lingvo, pri subvencioj kaj legacoj, sed ankaŭ pri eventualaj lingvokonfliktoj, kiel siatempe okazis kun Ido).

— Ĝi klarigu, ankaŭ per modifoj, kelkajn nebulajn punktojn en la nuna statuto, fiksi aktualajn celojn kaj igu la akademianiĝon pli altira por niaj seriozaj intelektuloj. Ekzemple, la statuto estas tiel interpretata ke kiu ajn povas kandidatiĝi, serĉante apogantojn por si. Mia opinio en gravan institucion kiel AdE oni estu invitita, laŭ precizaj reguloj, oni ne sin invitu! Mi siatempe rifuzis pro tio kandidatiĝi, kaj nur ĉar la karmemora sekretario Jean Thierry ĉion mem zorgis kaj metis min antaŭ faritan faron mi

akademiano ekde 1976, li jam funkciis de 1982 kiel sekretario kaj ekde 1986 kiel vicprezidanto de la Akademio —, ne estos por li facila tasko inde sekvi la trifoje reelektitan d-ro André Albault, kiu gvidis la laborojn de la Akademio seninterrompe dum kvar mandatoj ekde 1983.

Ni starigis la samajn du demandojn al d-ro Bormann kaj al la aliaj membroj de la nova estraro.

(1) Kiajn taskojn de la Akademio vi vidas antaŭ vi kiel plej gravajn?

(2) Kion vi mem planas aŭ ambicias?

akceptis prezentiĝi. Aliaj sendube pensas kiel mi, ne pro persona aplombo, sed pro respekto al la institucio.

Necesas havi ne nur korespondadon, sed ankaŭ de tempo al tempo labor-kunvenojn, por pli rapide kaj efike solvi kelkajn demandojn. Hastaj kontaktoj dum UK-oj (kiujn cetere malmultaj partoprenas) nek taŭgas nek sufiĉas.

— En la tuja estonteco la laboro de AdE devus esti dediĉita unuavice al problemoj de lingvouzado — esence pli al sintakso ol al leksiko. Por tio utilis kunlaboro de la sekcio pri gramatiko kun tiu pri ĝenerala vortaro. Estas laŭ mi superflue aldoni ke ne nur tiuj sekcioj, sed la tuta akademianaro devus aktive kunlabori en la reviziado de PIV, nuntempe kaj probable ankoraŭ dum longa tempo nia plej grava referenco.

Kompreneble, la listo de la farenadoj ne haltas ĉi tie, male. Mi aldonu nur plian punkton el la programo de prof. Duc Goninaz, kiu miaopinie utilis por doni novan elanon al nia institucio: la propono estis ke se la prezidanto de AdE estas eŭropano, la vic-prezidantoj prefere loĝu en aliaj mondpartoj.

(2) Miaj taskoj estas fiksitaĵoj de la statuto kaj de la ĝisnunaj kutimoj, kiuj emfazas striktan kunlaboron inter prezidanto kaj sekretario. Apartaj ambicioj miaflanke do ne estos, krom la klopodo realigi almenaŭ parte, kaj kiel eble plej rapide, la supre skizitajn prioritatojn, kunlabore kun la estimindaj gekolegoj. Plie, mi ŝatus rediskuti ankaŭ kelkajn solvojn pri landnomoj, kiel proponite al la tiama estraro, kune kun kolegoj Kiselman kaj Minnaja, jam antaŭ pluraj jaroj.

Gonçalo Neves, vicprezidanto



Gonçalo Neves (1964), portugalo, agronomo, laboras en nutraĵ-fabrika. Denaske edukas esperantlingvesian 3-jaran filinon, Saran, kun pasive esperantista edzino. Eklerninte Esperanton en 1987, inter 1987 kaj 1990 li postenis jenkielsekretario jenkielvicprezidanto de Portugala E-Asocio. Liaj poemoj, noveloj kaj recenzoj aperis ĉefe en Fonto, Literatura Foiro kaj Esperanto. Volumoj: Kompreni (novelaro, 1993); unu el la kvar poetoj de Ibero libere (1993).

(1) La E-parolantojn ofte ŝancelas la pluro, bunto kaj vario de opinioj, starpunktoj kaj eĉ “skoloj” pri multaj lingveroj kaj gramatikaĵoj kiujn ili dezirus pli klaraj kaj tuj aplikeblaj. En tiaj okazoj oni plurfoje sentas la mankon de oficialaj normigiloj. Ekzistas ja PIV kaj PAG, sed unuflanke ili ne estas “oficialaj”, aliflanke ili ne kapablas akompani la sciencan kaj teknikan evoluojn, kiujn la lingvo devas konstante postgalopi terminare kaj normige.

Ĉefaj taskoj de la Akademio devus esti do la kunkreado kaj kunverkado de grandaj oficialaj vortaro, gramatiko kaj pluraj terminaroj, aŭ argumentita

oficialigo de jam ekzistantaj, kaj konstanta aktualigado kaj diskutado pri novaj terminoj postverke aperintaj.

Krome, tiaj aktualigado kaj diskutado ne eblas per la lama kaj tro centrisma informfluo kiu regas en la Akademio. La cirkuleroj ne cirkulas cirkle, kaj ilin bremsas la helikeco de la poŝta sistemo. Tial multaj akademianoj ne emas partopreni, kaj la balotoj tutan jarcenton treniĝas. Endas do plej eble ekspluati la rapidajn komunikrimedojn (fakson, elektronikan poŝton, informpaĝojn, TTT-n).

Jen do la ĉefaj farenadoj, laŭ mi:

— Starigi kaj funkciigi grupon da akademianoj rete kaj fakte atingebblaj, facile kaj rapide alireblan kaj konsulteblan de la ekstera publiko kaj gazetaro.

— Terminologiaj taskoj: oficiala partopreno de la Akademio en la reviziado de PIV, analizado kaj oficialigado de plurbranĉaj terminaroj.

— Analizado kaj eventuala oficialigo de ekzistantaj kaj verkotaj gramatikoj.

Krom la supraj taskoj, ekzistas aliaj pli internaj, pli “burokrataj”, kiujn mi opinias apenaŭ menciindaj ĉi tie (starigo de balota proceduro, diskutado de kelkaj statutoj, i.a.).

(2) Helpi efektivigi la suprajn taskojn.

Gerrit Berveling, vicprezidanto



Gerrit Berveling (1944), nederlandano, estas pastoro, teologo, lingvoinstruisto. Li redaktas la literaturan revuon Fonto, prezidas E-lingvan Verkistan Asocion, kaj eldonis sub la marko VoKo pli ol kvardek titolojn, i.a. proprajn originalaĵojn kaj pli ol dudek siajn tradukojn, plejparte el la helena kaj latina.

(1) Taskoj urĝaj:

Reviziado kaj aperigo de Plena Ilustrita Vortaro.

Interkonsiliĝado pri tio kiel prezenti tute klare kaj nemiskompreneble ke la Fundamento de Esperanto senescepte

en ĉiuj siaj partoj estas *fundamento* de nia lingvo, ke do ne estas bone pere de rezonadoj provi levi iujn erojn el ĝi super aliaj eroj, kion bedaŭrinde ie-tie en Esperantujo oni renkontas.


(2) En renkontiĝoj elvoki debatojn pri aspektoj de la lingvo kiuj ĉiam ankoraŭ estas traktendaj/-indaj: aliflanke montri ke estas eble — kaj ne nur defendeble sed verŝajne eĉ saĝe — ne fiksi ĉiujn detalojn de la lingvo, ĉar certa libéraleco — certa nedifiniteco — estas necesa por teni la lingvon sufiĉe elasta.

Aktoj de la Akademio III: 1975-1991

Red. André Albault, Jean Thierry

Kun ampleksa dokumentaro pri la landnoma problemo.

1992. 79p. 13,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



Herakla laboro de William Auld

La Kunularo de l' Ringo. La unua parto de "La Mastro de l' Ringoj". John R. R. Tolkien (1892-1973). El la angla trad. William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. 543p. 20cm. Bind. 48,00 gld.

Verŝajne ĉiuj esperantistoj kiuj amas la 1300-paĝan epopean verkon *La Mastro de l' Ringoj*, iam fantaziis, sed ne kuraĝis, traduki ĝin en Esperanton. Kia ĝojo, do, konstati ke finfine iu ja entreprenis tiun Heraklan laboregon: kaj ne iu ajn, sed unu el niaj plej elstaraj verkistoj, poeto kaj tradukisto William Auld. Ĝis nun aperis nur la unua el la tri volumoj, *La Kunularo de l' Ringo*, sed laŭ plano la aliaj du baldaŭ sekvos.

Temas pri aventuro en fantazia mondo, en kiu loĝas ne nur homoj, sed ankaŭ elfoj, gnomoj, koboldaĉoj, drakoj, marŝantaj arboj kaj — tre aparte — *hobitoj*: homsimilaj estaĵoj kun malalta staturo, kiuj loĝas en

subteraj, sed tre komfortaj, loĝejoj, kaj aparte ĝuas abundan manĝadon kaj agrablan vivadon. Unu el ili hazarde akiras magian ringon, tiel potencegan ke ĝi altiras neimageble danĝerajn kaj timigajn malamikojn. Tiu estas devigata lasi sian trankvilan landon por fronti la plej streĉajn aventurojn en preskaŭ senespera klopodo detrui por ĉiam la ringon.

Tiu priskribo verŝajne donas la eraran impreson ke temas pri libro por infanoj. Tio kio levas ĝin super tiun nivelon, estas ne nur la grandioza vasteco de la tuta koncepto, sed ankaŭ la ekstrema realismo per kiu Tolkien pentris ĉiun plej malgrandan detalon de sia inventita mondo: ĝian geografion, ĝiajn lingvojn ktp.

La Provinco, kie la hobitoj loĝas, prezentas idealigitan, specife anglan kamparon. La nomoj de la hobitoj tre trafe rekaptas tiun etoson, kaj por tradukisto estas malfacila tasko redoni tiun etoson per same trafaj ekvivalentoj. Auld traktas la nomojn diversmaniere: foje per simple fonetika transskribo (Baggins → Baginzo), foje per traduko (Farmer Maggot → terkulturisto Larvo), foje per provo rekapti la ĝeneralan ideon donitan de la angla originalo (Sackville-Baggins → Retikul-Baginzo). Tiu nekohera mikso malsukcesas redoni la tre anglecan etoson de la originalo, kaj simple trafas iom strange.

Mi multe seniluziiĝis (aŭ kiel li mem dirus, desapontiĝis) pro la malkovro ke la lingvouzo estas sufiĉe malfundamenta. En preskaŭ ĉiu paĝo troviĝas formoj kiel *frida*, *olda*, *kurta*, *aperta*, *lanta*, *softa*, *dista* ktp. Aliaj neologismoj inkluzivas *hungro*, *ŝriki*, *furgono*, *permanenta*, *friska*, *descendi*, *trivi* kaj eĉ la hororaĵon *cis*. Preter tiuj malglaĵoj, la traduko legiĝas flue, klare kaj, kompreneble, senerare. Bedaŭrinde, ĝi tamen montras spurojn de hasto kaj nesufiĉa reviziado. Komparante la Esperantan kaj la anglan versiojn, ekzemple, mi tuj rimarkis mankantan frazon en la traduko.

Tiu hasto estas komprenebla, se oni konsideras la amplekson de la verko; en ĉi tia kazo kvalito devas cedi al la postuloj de kvanto. Praktike, necesas elekti inter neperfekta traduko kaj nenio. Sendube nur similaj konsideroj ebligis al Zamenhof traduki la Malnovan Testamenton; kaj tio estis tasko ne pli giganta ol tiu kiun nun entreprenis Auld.

Anna Löwenstein (Italio)

Premio de EVA/Edistudio

Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) kaj la eldonejo Edistudio decidis en somero 1995 revivigi la iaman kontrakton laŭ kiu EVA pere de komisiono premias iun tekston verkitan originale en Esperanto (prefere romanon aŭ rakonton), kiun poste aperigas Edistudio.

Aperis tiel en 1989 *Insulo de revoj* de Manjo Austin (premio 1989) kaj *Ĝambo rafiki* de Tibor Sekelj en 1991 (premio 1990). *Fadenoj de amo* de Gerrit Berveling estis elektita en 1991, sed ankoraŭ ne aperis. Estas nun la intenco ke ĝis la Praga UK ĝi vidu la lumon, kaj ke de tiam Edistudio iom regule, maksimume ĉiun duan jaron, eldonu premiitan verkon.

Do, aŭtoroj: ek al verkado! Ne estas tema limigo; la verko devas sufiĉe ampleksi por memstara eldono, sed ne pli ol 200 paĝojn en normala preso. La estraro de EVA starigas juĝkomisionon, kies konsiston ĝi poste diskonigos.

Antaŭ la UK en Prago sendu vian verkon al la prezidanto de EVA en du ekzempleroj, kaj aldonu blankan koverton markitan per via kaŝnomo; la koverto enhavu viajn veran nomon kaj adreson. EVA transsendos la verkojn al la juĝkomisionanoj, kiuj decidos pri la ĉi-jara premio. Monan rekompencon ni bedaŭrinde ne povas oferti, nur publikigon de la premiita verko.

Gerrit Berveling, prezidanto de EVA
Muiderslotstraat 69, NL-4834 KM Breda, Nederlando



Havu tempon por...

La aboco de tempoplanado. Lothar J. Seiwert kaj Winfried U. Graichen. El la germana trad. E-grupo Stuttgart. Roterdamo: UEA, 1995. 53p. 20cm. Konsilaroj por Aktivuloj, n-ro 2. 7,50 gld.

Ĉu tempo mankas al vi por fari ĉion kion vi volas?	
Ĉu vi matene vekiĝas kun la kapo ankoraŭ plena de la hieraŭaj taskoj?	
Ĉu vi preferas fari la aferojn ĝuste ol fari la ĝustajn aferojn?	
Ĉu vi surpriziĝas kiam 20% el via laboro donas 80% de la rezultoj?	

→ Tiam ĉi tiu libreto helpas vin

- difini **celojn**
- fari **tagplanojn**
- fiksi **prioritatojn**
- **transdoni** taskojn al viaj kunlaborantoj

Ĝi helpas precipe se vi estas **direktoro** laboranta tuttage pri tiaj taskoj, kun **kunlaborantoj** salajrataj kaj servopretaj. Sed ankaŭ kiel (ekzemple) ordinara **E-aktivulo** kun pli da planoj ol da tempo, vi trovos multon utilan ĉi-libre. Tamen neniun konsilon por aktivigi libertempe viajn nehelpantajn kunklubanojn lacajn post alia laboro. Tio povus esti temo por numero 3 de la *Konsilaroj por Aktivuloj* de UEA.

Sed jen n-ro 2, riĉa kompendieto de simplaj kaj saĝaj konsiloj, vendita germane (kaj alilingve?) en 500 000 ekzempleroj, senriproĉe esperantigita, kaj alloge enpaĝigita kun tabelaj tekstoj kaj enmarĝenaj gvidvortoj.

Douglas Draper (Norvegio)



– *direktoro*

– *E-aktivulo*

– *saĝaj konsiloj*
– *senriproĉa E-o*
– *alloga grafiko*
(kiel ĉi tie)

Ĉio enordas klasike

Fragmentoj. Leen Deij. Croix: Giloteaux, 1994. 56p. 21cm. Ilus. 10,50 gld.

La nomon Leen Deij eble ne multaj konas: kvar liaj poemoj aperas en la unua eldono de *Esperanta antologio*, kaj spureblas aliaj en *Malgranda Revuo* kaj *Literatura Foiro*. Tamen pluraj populariĝis dank' al la muzikigoj de Kajto kaj J. Dinnyés.

En mallonga enkonduko, la aŭtoro esprimas sian sintenon al nia poezio, kiun mi plene kunsubskribus: "Pri Esperanta poezio mi havas simplan opinion. Ĝi devas esti Esperante bona, sen eraroj, sen torditaj frazoj, bone elparolebla. La leganto rompu al si nek la kapon, nek la langon."

Li sukcesas. En ĉiam striktajn versoskemojn Deij enblovas tamen freŝon,

ritmon kaj sugeston. De teknika vidpunkto, absolute ĉiuj poemoj en la libro estas rigore konstruitaj rime, skande, akcente kaj piede: ĉio enordas klasike, ĉio situas ĝustaloke, kaj ĉiuj poemoj tre bone tratoleris laŭtleĝon, kio — dirite inter ni — ne tro oftas en nia originala poezio. Leen Deij, kiel ĉiuj bonaj poetoj, havas apartan sentivon pri la ritmo, kaj tre kapablas transigi ĝin al siaj poemoj.

Malgraŭ tio, forma perfekte ne ĉiam signifas enhavo-riĉon. Foje — nur foje — unuopaj poemoj ne instigas, ne tiklas la leganton, sed nur traorelas lin, ja lirlle, sed seninterese. Multaj poemoj tamen kapablas vekti nian atenton pri

la enhavo dank' al feliĉa kombino de senriproĉa tekniko kaj bona temo, kiel la eksterordinara "Pluvo". Ĉi poemo dividas ne facile klarigeblan etoson kun aliaj en la libro; trasentiĝas ia melan-kolio, ia tristeto, kvazaŭ la aŭtoro ade konstatus ke la vivo-rekremento post-lasas amaran guston. Tio certe ne implicas profundan pesimismon: Deij ja ankaŭ kapablas verki ĉarmajn porinfanaĵojn, sed la plej multaj poemoj en *Fragmentoj* giras ĉirkaŭ milito, socia maljusto, tempo-paso kaj homa soleco.

Leen Deij — unulibra poeto, kiel Newell, Tárkony aŭ Sadler — eble ne iĝos unu el la princoj de la Esperanta parnaso, sed li montriĝas tre leginda poeto, kies *Fragmentoj* — faro farinton rekomendas — rivelas lin honesta, nobla, digna homo.

Antonio Valén (Hispanio)

La buba raso, en la bona lingvo

La buton-milito (1912). Louis Pergaud (1882-1915). El la franca trad. Roger Bernard. Saarbrücken: Iltis, 1991. 198p. 21cm. 52,20 gld.

Kiu ne memoras ŝtonbatalojn el sia infanaĝo, kun katapultoj aŭ ĵetiloj? En Chantada (nomo de mia strato) konfliktis infanaj armeoj el proksime apartaj domblokoj, ne el malsamaj vilaĝoj, kiel en *La buton-milito*, romano el 1912. Kaj ni ludis similajn ludojn: globetojn, ŝafsaltadon, kaŝkaŝon (aŭ, zamenhofe, kaŝiĝon). *La buton-milito* vivigas ĉi mondon, ĉiutage pli kaj pli foran de tiu de nuntempaj, nun-urbaj infanoj telepupaj kaj komputilaj.

Priverki la buban rason signifas ankaŭ vidigi ĝiajn diversajn facojn. Troveblas do jen kaj jen, interalie, ekzemploj de infana kruelo: la vortoj de Lebrac pri ĉifonisto laŭdire juda (p.77) aŭ pri lama samklasano (p.154), la pantalon-epizodo (ĉ. p. 100) aŭ la tuta ĉapitro "Puno por la perfidulo". Ĉi kruelo ne nur montras la reversion de la sovaĝaj infanludoj, sed samtempe spegulas la kruelon de la mondo adolta. Ĉiel ajn, malkiel la ĉi-teme komparebla *Sinjoro de la muŝoj* de William Golding, *La buton-milito* precipe kaj principe celas distri kaj amuzi; kaj do kruelo, kiel socia hipokriteco (p. 116), ludas en la verko rolon ja gravan, sed tute ne ĉefan.

La aŭtoro malŝatas la hipokritan prudon de multaj verkistoj (p. 7). Tial li redonas senŝanĝaj la parolojn de la infanoj, plenajn je tabuaj vortoj kaj insultoj, ekzemple kiam Grangibus ra-

LOUIS PERGAUD LA BUTON- MILITO



Ĉu vi jam rekotizis por 1996?

Se ne, tiu ĉi estas la lasta numero de nia revuo kiun vi ankoraŭ ricevas!

kontas (p. 13) ke "ili ĵetis al ni nomojn: piĉuloj, kretenoj, ŝtelistoj, porkoj, putraj, kadukaj, merdaj; molkojonaĵoj..."

La traduko de Roger Bernard eminente rekreas ĉi lingvaĵon, foje per esprimoj kaj dirmanieroj ne konformaj al reguloj de ortodoksa gramatiko. Ekzemplo: la uzo de artikolo antaŭ nomoj de knabinoj ("la Maria", "la Taviĉ"), devio disde la normo, akceptebla kiel vulgarismo. Mi nur ne komprenas la eŭfemismajn liter-elizojn (kiel f...i anstataŭ *feki*, p. 126), ĉefe tial ke la samaj vortoj en sia plena formo aperas en la romano abunde kaj fekunde. Sed *La buton-milito* ne konsistas nur el infanaj diroj, ĉar la plumo de Pergaud ankaŭ priskribas pejzaĝojn, vilaĝojn kaj vizaĝojn, rakontas batalojn, ludojn, anekdotojn, kaj ĉion ĉi Bernard redonas en modelstila Esperanto, en la bona lingvo.

Georgo Kamaĉo (Hispanio/Belgio)

Por ĵusaj gepatroj

Sukcesa mamnutrado. Anna Löwenstein. Roma: Associazione per l'Allattamento Materno, 1995. 26p. 30cm. 9,90 gld.

En mia loĝlando, Nederlando, doktoroj instigas patrinojn mamnutri siajn bebojn. En mia naskiĝlando, Francio, oni malofte kuraĝigas al tio. Naskinte mian filinon en Nederlando, mi do mamnutris ŝin — sed sciante nenion pri la temo "mamnitrado". Klára aĝis jam du monatojn kiam mi legis ĉi tiun broŝuron, kaj mi bedaŭras la malfruon. Mia bebo profitus pli dank' al la konsiloj teknikaj, dietistikaj, medicinaj, biologiaj kaj psikologiaj de onjo Anna. Ŝia libreto enhavas ĉiujn informojn kiujn ĵuspatrinoj kaj iliaj partneroj bezonas, kaj ĝi aparte utilos al tiuj kiuj devas defendi sin kontraŭ socia premo malinstiganta al mamnutrado. Malgraŭ foje troa, eĉ fanatika entuziasmo (oni ricevas la impreson ke ĉiuj bovinlakte nutritaj homoj fariĝas malsanaj), la verko postulas lokon sur la bretoj de E-familioj.

Fabienne Berthelot
(Francio/Nederlando)

Balzamo por la oreloj

Kantoj de l'popolo. Ĥoro Cantica, Muzikensemblo Kečka. Prago: Kava-Pech/Giessner, 1993. 27 slovakaj popolkantoj. 61-minuta. Kasedo 13,20 gld., kompaktdisko 19,80 gld.


La aŭtentika slovakeco de tiu ĉi "albumo" strange memorigas pri latin-amerikaj aborigenoj (la paŝtista fluto) sed ankaŭ pri ciganoj (kordoj melankoliaj). Tiom tro diveneble la melodioj flatas. Teknike perfektaj, sed idiliaj, himneskaj kun sentebla manko de spico. Nur du eroj viglas: "Trinkokanto" kaj "Dancu, dancu".

Peter Sarnovský nekutime klare prononcas la tekstojn rilate al pejzaĝo kaj interamiĝoj klasikaj en popolkantoj.

La tekstojn en tre zorge redaktita kajereto reverkis Joachim Giessner, sed bedaŭrinde kun povra rimado — preskaŭ nur helpe de personaj pronomoj kaj adasismoj. Ekzistas ja poetiko por E-o, ekzistas almenaŭ rimvortaroj.

Poul Thorsen (Danio)

Laste aperis



Beiträge zur Interlinguistik. Alicja Sakaguchi, Sabine Fiedler, Manfred Sailer. Red. Hermann Ölberg. Innsbruck: Universität Innsbruck, 1995. 29+30+30p. 30cm. Tri esperantologiaj referaĵoj. 22,50 gld.

10 jarojn poste. Prifutura aventuro. Verkis kaj desegnis Johnny Humphreys. Berkeley: Bero, 1995. 28p. 28cm. Bildrakonto pri la mondo post nuklea katastrofo. 7,80 gld.

Esperantem za tři měsíce. Petr Chrdle, Stanislava Chrdlová. Dobřichovice: Kava-Pech, 1995. 159p. ISBN 80-85853-10-8. 20cm. 60-leciona kurso por ĉeflingvanoj, elernebla en tri monatoj. 17,40 gld.

Esperanto — Curso del idioma internacional. Miguel Gutiérrez Adúriz (1950). Santander: PAS, 1995. 118p. ISBN 84-920931-0-2. 24cm. Ilus. Lernilo por hispanlingvaj komencantoj. 16,50 gld.

Esperanto — Curso del idioma internacional; Clave de los ejercicios. 32p. ISBN 84-920931-1-0. 24cm. Solvo de la ekzercoj. 6,00 gld.

Esperanto-Dokumente 2. Detlev Blanke, Wera Blanke. Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut, 1995. 32p. 21cm. Esperantlingva. Du prelegoj: "Esperanto kaj lingvistiko — sciencpolitikaj aspektoj" (D. Blanke); "Fakvortoj en Esperanto — kion fari, se la vortaro ne plu helpas?" (W. Blanke). 4,20 gld.

Esperanto-Dokumente 3. Rainer Heckhausen, Werner Bormann, Marco Picasso, Franz Josef Braun. Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut, 1995. 47p. 21cm. Esperantlingva. Kvar prelegoj pri ekonomio, komerco kaj Esperanto. 5,10 gld.

Esperanto-mongola vortaro. Ŝ. Janŝanĝav. Ulan-Bator: Ĉandmanj, 1995. 191p. 22cm. Bind. Ĉ. 13 000 vortoj. 24,00 gld.

Facila vortareto Esperanto-persa. Red. M. Reza Torabi. Irana E-ista Junulara Organizo, 1994. 17p. 21cm. Ĉ. 800 kapvortoj. 3,00 gld.

Fundamentoj de lineara algebro. Ulrich Matthias (1966). Neckarhausen: la aŭtoro, 1995. 27p. 21cm. Bazaj difinoj, konkludoj kaj teoremoj. 3,30 gld.

Lerni pentradon. Adaptis Gu Zhongjin. Pentris Chao Xidi. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 16p. 21cm. Bildlibro: Kiel Tang Yin fariĝis majstra pentristo. 3,30 gld.

Levi ŝuon. Adaptis Gu Zhongjin. Pentris Mu Yongrui. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 16p. 21cm. Bildlibro: Kiel Zhang Liang fariĝis granda militestro. 3,30 gld.

Max kaj Moritz. Buba rakonto en sep petoloj (1864). Wilhelm Busch (1832-1908). El la germana trad. Franz Döring. Saarbrücken: Iltis, 1995 (2-a eld.). 57p. ISBN 3-927613-29-0. 21cm. Amuza, abunde ilustrita poemo por infanoj. 14,70 gld.

Patrinon mi amas eterne. Iraĝ Mirza. Ilustris Bahram Ĥaef. El la persa trad. Maryam Nezami. Tehran: Atai, 1995. Trilingva: persa-angla-Esperanta. Unu poemo sur ses artismaj kartoj, kun ŝirmkovrilo. 18,00 gld.

Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo. Andrea Chiti-Batelli, Pierre Janton. La unuan parton el la itala trad. Umberto Broccatelli. Rotterdam: UEA, 1995. 19p. 21cm. Esperanto-Dokumento 33E. Propono por eŭropa strategio de la Esperanto-movado. 4,80 gld.



Verdaj Donkiĥotoj (1933). Julio Baghy (1891-1967). Vieno: Pro Esperanto, 1996. 175p. ISBN 3-85182-036-3. 23cm. La malplej konata romano de Baghy: *Paŭlo Paal*, kaj kelkaj satiraj portretoj pri tipaj movadanoj. 28,20 gld.

Versaĵoj. Asdreni (1872-1947). El la albana trad. Vasil Pistoli. Tirano: Albana E-Ligo, 1991. 23p. 16cm. 11 poemoj de eminenta verkisto de la "albana renaskiĝo". 3,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Kasedoj: Muzilo. 1992. Kantoj de Mozart, Bach, Händel, Chopin, Schubert, Rubinstein, Moniuszko ktp, kaj diversaj polaj popolkantoj. **Polaj kolendoj. Kristnaskaj kantoj.** 1987. Dek du pecoj. **Sub la stel' de l' espero.** 1994. 24 kantoj, de Brahms, Ĉajkovskij, Seroczyński, Moniuszko, Boccherini kaj Giordani. Ĉiuj tri: Kantas koruso "Muzilo". Eldonis: Varsovio: Pola Esperanto-Asocio. Po 18,00 gld.



La eldonejo Pro Esperanto en Vieno plej fervoras pri originala beletro, same premiere kiel represe.

Proponaro por la Esperanto-informado. Marcus Sikosek (1973). Antwerpen: FEL, 1995 (2-a, pli ampleksa eld.). 129p. Du kalendaroj. ISBN 90-71205-61-4. 21cm. 10,20 gld.

Proponoj por la esperantigo de katalunlingvaj loknomoj. Hektor Alos i Font (1965). Barcelono: la aŭtoro, 1995. 33p. 30cm. Ringe bind. Principoj kaj ekzemploj. 8,40 gld.

Provu por via sano. Kompilis kaj el la ĉina tradukis Liu Caisheng (1941). Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 132p. ISBN 7-5052-0146-8. 19cm. Tradiciaj ĉinaj kuracmetodoj facile lerneblaj. 16,50 gld.

Rakonto pri Sima Guang; Elpreni pilkon. Adaptis Gu Zhongjin. Pentris Sha Gengshi. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 20p. 21cm. Bildlibro: Infanaĝaj aventuroj de du famaj politikistoj. 4,20 gld.

Serĉi instruanton. Adaptis Gu Zhongjin. Pentris Mu Yongrui. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 24p. 21cm. Bildlibro: Kiel Ye Tianshi fariĝis perfekta kuracisto. 4,80 gld.

Tena. Hejmo en Mezeŭropo. Spomenka Štivec (1949). Vieno: Pro Esperanto, 1996. 104p. ISBN 3-85182-038-9. 23cm. Mallonga romano: la morto de avino donas okazon rakonti pri la "privata Mez-Eŭropo" de ĉi tiu jarcento. 22,50 gld.

Komputila disko: Un privé dans la nuit. Pétilon. Nanterre: Memory Access, 1995. ISBN 2-911274-00-8. Al Esperanto trad. Michel Audibert. Voĉlegas M. Audibert, Jean Thierry. "Detektivo en la nokto": interaga bildrakonto sur codoromo, kun muziko, kun parolsono kaj skribita teksto en la lingvoj angla, Esperanto, franca, hispana kaj japana. 16 historioj en 300 bildoj; ĉ. 4-hora legado. Bezonataj: minimume CPU 80486DX/33 MHz, monitoro SVGA, 8 MB ĉefmemoro, codorom-legilo kongrua kun plurmedia PC, *Sound Blaster*-kongrua sonkarto, Vindozo 3.1 aŭ posta. 48,00 gld.

Puzlo: La domo. Ana Beroš. Soultzmat: Pirolo, 1995. 200 pecoj. 40x29cm. 39,60 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldona valoro imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



• Bahaismo: Helplingvon ĉe UN

La dokumento *Turnopunkto por ĉiuj nacioj. Deklaro de la Bahaa Internacia Komunumo* okaze de la 50-jariĝo de UN vidas kiel unu el “kvina eblaj paŝoj farindaj por fortigi la Ĝeneralan Asembleon” ke UN starigu komisionon por “studi la temon de internacia helplingvo kaj de la alprenado de komuna skribo”. UN “grave profitus se ĝi aŭ elektus unu ekzistantan lingvon aŭ kreus novan, uzotan kiel helplingvo en ĉiuj ĝiaj forumoj”. Tio estas deĉiamata starpunkto de bahaanoj, kiuj tamen ne subtenas iun konkretan lingvon.

• Botaniko: Floroj kaj nomoj

Pri la 12-a Flaŭrista Semajno, kiun Rondo de E-istaj Flaŭristoj (REF) aranĝas en la francaj Vogezoj (27 majo - 2 jun., Mittelwihr), informas Ru Bos-song (Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven, Nederlando; tel. +31/40/211-41-62).

Okaze de la dekjariĝo de REF en 1995, aperis ĉe Bernhard Eichkorn (Romäusring 20, DE-78050 Villingen, Germanio) 8-a stud-eldono de *Plur-lingva nomaro de sovaĝaj plantoj en Eŭropo*. Ĉe Eichkorn haveblas ankaŭ, je po 10 markoj, franca-E, germana-E, nederlanda-E (kaj baldaŭ angla-E) versioj de nomaro pri pli ol 3500 plantospecioj.

• Filatelo: Danaj stampoj

En 1996 la dana poŝto uzos Esperantan reklam-stampilon en 5 lokoj dum po 5-7 semajnoj. Por akiri la stampon, sendu adresitan koverton kun internacia respondkupono al Esperanto-Unuiĝo de Naestved: Fyrrevaenget 4, DK-4700 Naestved, Danio.

• Instruado:

Kunkompilu por Unesko


Laŭ mendo de Unesko, Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj preparas kompilaĵon pri diverslandaj lernolibroj (por ĉiuj aĝoj) kiuj traktas aŭ mencias la mondan lingvoproblemon, Esperanton aŭ aliajn planlingvojn, Zamenhof kaj homaranismon. Bv. sendi kopion, E-lingvan resumon kaj bibliografiajn detalojn de la koncernaj tekstoj, informante kiel ili estas utiligataj, al la sekretario de ILEI: Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

• Kibernetiko: Ĉu Esperante?

Petr Chrdle (Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio) informas ke inter la laborlingvoj de la 6-a Internacia Konferenco pri Kibernetika Pedagogio (28-30 majo, Prago) viciĝos Esperanto, kondiĉe ke aliĝos altnivela prelegonto kies gepatra lingvo estas ne la ĉeĥa, slovaka, angla aŭ germana.



Strato Esperanto en Salou (vd. ZEO-j)



Pledo por pli da precizo

Diferenco inter movado kaj komunumo

La esejo de Nikola Rašić pri sociologia esplorado en Esperantujo (“Pledo por sociologio de la Esperanto-movado”, majo ’95, p. 90-92) ne kontentige tuŝas ĉiujn gravajn aspektojn de la temo. Unue, la aŭtoro skribas pri la Esperanta movado anstataŭ pri la pli vasta kaj sociologie pli signifplena fenomeno de la Esperanta komunumo. Pro tio li preteratentas homtipojn kiuj ne apartenas en iuspeca formala maniero al movadaj institucioj kaj organizaĵoj, sed kiuj interagas, kontraŭagas kaj malagas en la tuta teritorio de Esperantujo. Inter ili estas jenaj personoj:

1. izoluloj, kiuj, jen devigitaj pro vivcirkonstancoj, jen pro propra volo, staras ekster ĉiuj sociaj grupiĝoj kaj evitas kontaktojn;
2. eksesperantistoj, kiuj rompis siajn ligojn kun la lingvo kaj ĝiaj uzantoj sed kiuj konsistigas riĉan fonton de donitaĵoj pri la funkciado kaj misfunkciado de kleraj kaj sociaj rilatoj inter la membroj de la Esperanta komunumo;
3. “malesperantistoj”, kiuj agadas negative pro manko de sentoj de solidareco, sed kiuj ne estas ekskludeblaj en sociologia analizo de la komunumo, ĉar ilia efiko estas sentebla, eĉ se subgrunde kaj kaŝe

malantaŭ la kulisoj de la organizita movado.

Misoj kaj mankoj en la difinoj de “esperantisto”

Rašić mispaŝas ankaŭ rilate siajn du difinojn de “esperantisto”:

1. persono kiu parolas Esperanton;
2. persono kiu sentas apartenon al la Esperanto-komunumo, kiu sentas solidarecon kun ties membroj, kaj kiu dividas kun ili diversajn komunajn ideojn.

Rigardante la temon strikte objekte, oni ne povas akcepti la karakterizon de esperantisto kiel persono kiu simple “parolas” la lingvon. La solaj veraj esperantistoj devas posedi sufiĉe da praktika lingvoscio por ebligi partoprenadon en plej diversaj agadoj de la ĉiutaga vivo. Pro tio, ne estas parolantoj de Esperanto “bonan-tagon”-uloj, eternaj komencantoj kaj unuakursanoj. Nuntempe pli senchava por nomi verajn parolantojn estas la termino “esperantofonoj”. Estas bezonata ankaŭ aparta nomo por karakterizi homojn kies agado estas limigita al oku-

• Muziko: Reklamo per Esperanto

La bretona rokgrupo EV (kiu kantas bretone, finne kaj france) antaŭreklamis sian franclingvan albumon *Reuz* dissendante al radio-stacioj, muzik-revuoj ktp. sian E-lingvan registraĵon "La bordulin' de Sarre", kiu troveblas ankaŭ sur la kompakta disko/kasedo *Vinilkosmo-kompil'*. (JEFO Informas)

La itala kantisto Rosario di Bella titolis sian novan diskon *Esperanto*, pro ties miksa stilo kaj ĉar "li ŝatas la ideon de monda harmonio". (Eventoj)

• Psikologio: Malsanuloj serĉataj

Anoj de Ĉeĥa Asocio por Psika Sano (Česká společnost pro duševní zdraví, esperantská skupina, Skautská 1081, CZ-70800 Ostrava-Poruba, Ĉeĥio) lernantaj E-on serĉas e-istojn psike malsanajn, sed memrajtajn, por korespondo kaj reciproka gastigado. (Starto)

• Scienco: Likena festlibro

La Provenca Linea Societo eldonis festlibron por la 80-jariĝo de Georges Clauzade, la franca likenologo kiu en 1985 publikigis, tute en Esperanto, la 900-paĝan verkon *Likenoj de okcidenta Eŭropo*, kun sia disĉiplo Claude Roux. La memorlibro, redaktita de Roux, enhavas ĉ. 30 kontribuojn: tri en Esperanto, la aliajn kun E-resumo. (SAT-Amikaro)

piĝo pri ideologiaj, organizaj aŭ sentimentaj rilatoj ene de la komunumo; sekve, ili havas minimuman motivadon por alproprigi kaj uzi la lingvon.

Obseda demando pri la personeco de esperantistoj

Raŝiĉ celas solvi jenan problemon: Ĉu ili estas tiaj homoj ĉar ili estas esperantistoj, aŭ ĉu ili fariĝas esperantistoj ĉar antaŭe ili estas tiaj homoj? Ankaŭ tie ĉi obstaklas la esploron la nepreciza diferencigo de la du tipoj de esperantisto kiujn Raŝiĉ provis difini. Cetere, estas necese fari tiujn du demandojn rilate eksesperantistojn por ekscii kial ili estas tiaj. Ĉu la kialo de ilia perdo de intereso estas fiaskinta provo primajstri malfacilaĵojn en la lingvo, aŭ ĉu la kaŭzo estas ke naŭzis ilin la konduto de membroj de la Esperanta komunumo? Fine, kiaj personec-tipoj en la makrosocio ekster Esperantujo montriĝas tiel rezistemaj kaj harditaj kontraŭ la ideologia flanko de Esperanto ke ili neniam sentas emon fariĝi esperantisto?

Bernard Golden (Hungario)

• Sporto: Provu denove

La 16-jara Máté Baranyai planis ĉirkaŭkuri la hungarian lagon Balatono (majo '95, p. 100): pro tuttaga pluvo, li kaj la kvin kunkurantoj devis rezigni post 50 kilometroj kaj daŭrigi bicikle. Post tiu neplena sukceso lia instruisto Ernő Csiszár (Erdődy Pálffy Tamás u. 25.V.16, HU-8100 Várpalota) jam invitas al kunbiciklado/kunkurado ĉi-jare: ordinara harditeco sufiĉas.

• Tradukado: Dulingva eldonisto

Tibor Szabadi, eldoninto de *La ora papilio* kaj *Pum*, la koboldo de Leopold Vermeiren, eldonis sian propran hungarigon de ĉi tiuj du verkoj, plus — en Esperanto — *La nuda feino* de Vermeiren kaj *Pluk* de Poul Thorsen.

• ZEO-j: Du novaj stratoj

En la urbo Salou (Katalunio), kadre de la 54-a Hispana Kongreso de E-o (9-12 nov.), oni oficiale inaŭguris la ŝildon de nova strato Esperanto. (Sur la foto maldekstre: "Klerec-reĝino 1995" el Sabadell kaj la prezidanto de Hispana E-Federacio, Antonio Alonso Núñez.) En Sabadell, la 16-an de decembro, okazis la inaŭguro de pasejo Lluís Mimó, pri kies nom-atribuo ni jam raportis (dec., p. 216). (V. Hernández Llusera)

Kiel fidela hundo

Kelkaj membroj de la Grupo de Esperanto de Valencio, kiuj apartenis al la Loka Kongresa Komitato de la UK en Valencio (1993), deziras klarigi rilate la artikolon "Centoj da E-libroj rubujn" (okt., p. 180):

1) La libro *Kiel fidela hundo* estis eldonita ne de la Loka Kongresa Komitato, sed de la urbestro de Valencio. La skabeno pri kulturo de la urbo petis la disdonadon de tiu libro al la partoprenantoj de la kongreso. Neniu membro de LKK faris la tradukon aŭ korektis ĝin.

2) LKK estis dankema al la urbestro de Valencio, ĉar tiu ĉi instanco pruntis senpage la Muzikan Palacon kiel kongresejon.

3) La eldono de la brila traduko de la poemoj de la klasika Valenciana poeto Ausias March estis farita de la valencilanda aŭtonoma registaro (*Generalitat Valenciana*). Oni prezentis tiun ĉi tradukon dum la kongreso en solena akto.


Valencia Esperanto-Grupo



• Havel, Herzog: Alta protekto

La prezidento de Ĉeĥa Respubliko, Václav Havel, akceptis fariĝi Alta Protektanto de la 81-a Universala Kongreso, kiu okazos de la 20-a ĝis la 27-a de julio en Prago.

La federacia prezidanto de Germanio, prof. Roman Herzog, estos la Alta Protektanto de la 52-a Internacia Junulara Kongreso (29 jul. - 5 aŭg., Güntersberge, Germanio). Anoncis jam sian pretecon membrigi en la Honora Komitato de la IJK prof. Reinhard Selten, Nobel-premiito, kaj prof. Lee, prezidanto de UEA.



Václav Havel

• Lee: Ĉina ordeno

Prof. d-ro LEE Chong-Yeong ricevis en Pekino, la 28-an de septembro, "ordenon de amikeco", kiun la ĉina registaro starigis en 1991 kaj ĝis nun asignis al 274 eksterlandaj fakuloj kaj elmigrintaj ĉinoj kiuj kontribuis en sia kampo al la progreso de Ĉinio. Prof. Lee meritis la ordenon per multjara kontribuo al la plibonigo de la cikulado de agrikulturaj produktoj en Ĉinio. (La Lanterno Azia, EPĈ)



• Pollando: Grabowski serĉas eldoniston

La 16-an de novembro oni inaŭguris memortabulon ĉe la Varsovia Universitato omaĝe al la E-pioniro Antoni Grabowski. Ĝin financis ties nepo, prof. Antoni Kruszewski (Usono). Naskiĝis la ideo aperigi libroforme ĉiujn Grabowski-verkojn dise troviĝantajn en revuoj. Serĉatas eldonemulo. (A. Pettyn)

Post kelkajara paŭzo, denove okazis, la 11-an fojon, ARKONES — Artaj Konfrontoj en Esperanto (Tuczno, 20-22 okt.), kun 43 partoprenantoj. (A. Sochacki)

• Argentino: Tutlanda unuiĝo

La du tutlandaj asocioj, Argentina Esperanto-Ligo kaj Argentina Esperanto-Asocio, decidis en eksterordinara jarkunveno, la 9-an de decembro en Bonaero, unuiĝi sub la nomo Argentina Esperanto-Ligo. La provizoran estraron prezidas Silvia E. Rottenberg. Kiel komitatano por Argentino elektigis Atilio Orellana Rojas, kiel ĉefdelegito kaj kotizperanto Rodolfo Calógero. La nova kaj sole valida adreso de AEL estas: Casilla de Correo 2910, Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

La posedantoj de la gastejoj Los Notros kaj Patagonia Andina (Morales, 564, AR-8400 San Carlos de Bariloche), ĵusbakitaj esperantistoj, donas rabaton al tranoktantaj samlingvanoj. (*La Lampiro*)

• Britio: Kimra kurso

Tri radio-intervjuoj kaj deko da lokaj ĵurnaloj menciis la aperon de senpaga koresponda kurso en la plej parolata kelta lingvo, la kimra. Ĝin pretigis Mari Roberts kaj administras E-Federacio de Kimrio. (H. Chapman)

• Germanio: Rekorda IS

La 39-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (27 dec. - 3 jan., Wetzlar) estis verŝajne la plej granda junulara Esperanto-aranĝo de la pasintaj kvin jaroj kun siaj 350 partoprenantoj el 30 landoj. Lige al la temo "Perforto" oni aŭdis i.a. pri junulara krimado, perforto kontraŭ infanoj, rifuzo de militservo. Pri la katastrofo en Ruando parolis Edmondo Uzziel, kiu en somero 1994 fuĝis el sia hejmlando. (U. Matthias)

• Nederlando: Turismi en la Centra Oficejo

La 3-an de januaro Aleksej Salomatov gvidis al Roterdamo ĉ. kvardek-kapan turisman grupon de rusaj esperantistoj, partoprenintaj en la 39-a IS. Akceptis ilin la eksa kaj nuna Ĝeneralaj Direktoroj de UEA, Simo Milojević (maldekstre, meze) kaj Osmo Buller (dekstre, supre).



Foto: Francjo Veuthey

Pola Radio ĉe vi

Komence de januaro Pola Radio aliĝis al la Monda Radioreto (WRN), kiu peras elsendojn de diverslandaj radiostacioj al lokaj kabloraĵoj. La Esperanta redakcio disponas kvar minutojn de la tempo de Pola Radio, kiuj estas aŭdeblaj je 18h25 laŭ Universala Tempo (19h25 MET). Ili estas elsendataj perkable almenaŭ en jenaj urboj kaj regionoj:

Aŭstrio: Vieno; **Belgio:** Antverpeno, Bruselo; **Britio:** Avon County, Birminghamo, Edinburgo, Londono, Manĉestro, Newcastle/Tyneside, Surrey, Sussex, Wessex; **Francio:** Strasburgo; **Germanio:** Berlino, Bonn, Düsseldorf, Kolonjo; **Irlando:** Cork, Dublino, Galway; **Nederlando:** Amsterdamo, Roterdamo.

La Monda Radioreto estas aŭdebla ankaŭ en Usono kaj Kanado, sed je la redaktifino mankis detalaj informoj. La frekvencoj varias laŭloke. Se vi ne trovas la frekvencon de via urbo, bv. peti ĝin de Pola Radio, Esperanto-redakcio, P.O.B. 46, PL-00-977 Varsovio; telefakso +48/2/645-59-19.

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kovrilpaĝo.

Antaŭ du mil jaroj. Tre interesa romano pri romia senatano en la epoko de Jesuo, kaj liaj postaj reenkarnejoj. Eldonis FEB (Brazilia Spiritisma Federacio). Petu senpagan ekzempleron de: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

Komputilon bezonas la sola funkcianta E-centro en Srilanko, Ja-Ela. Ĉu vi povas donaci aŭ helpi aĉeti ĝin? Dankas U. Zeiter Perera, 197 Indivitiya Rd., Hettigama, Ja-Ela, Srilanko.

Nova adreso de Georgo Kamaço: Jorge Camacho, Champs Elysées 18 D, B.6, BE-1050 Bruxelles, Belgio. Tel. +32/2/648-80-31.

La adreso de la asocio **Esperanto Nederland** estas: p/a sekr. Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, NL-9715 RW Groningen, Nederlando. (En januaro erare aperis Arubastraat 53.)

Libro serĉata: Franca traduko de *Imperialismo* de Lenin, la eldono kiun Lanti citis en sia *Laborista esperantismo* (Leipzig 1928, p. 29, noto 1). Bv. oferti prezon. Se ne la tuta ekzemplero, fotokopio de la paĝoj 119-120, kie aperas la linioj: "la rekta batalo kontraŭ la imperialismo estas absolute vana", sufiĉos. Okaze de libro, kontrolo ĉu la supraj linioj troviĝas. Povas esti ke tiaj ne troviĝas, ofertu ĝin tutegele. YAMASAKI Seikō, JP-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12. Fakso: +81-3-3285-9969, retpoŝto: study069@jpndokyo.dokkyo.ac.jp.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp; fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

Tutmonde korespondus Togolanda junulo (19 j.): Richard Sambar-Bana, s/c Soeurs de la Providence, St. Paul de Komah, B.P.41, Sokode, Togolando.

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Usono: W.K. Bledsoe.

PATRONOJ DE TEJO 1995

Britio: Ian C. Jackson. Por 1995 entute 93 Patronoj.

SOCIETO ZAMENHOF 1995

Britio: Ian C. Jackson; Judith Jackson; Robin Jackson. Por 1995 entute 271 SZ-anoj.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA 1996
SUBTENANTOJ (minimumo \$25):
Usono: R. Paul Lynch.

AMIKOJ (minimumo \$10): Usono: Larry M. Gregg.

PATRONOJ DE TEJO 1996

Britio: Ian C. Jackson; Adrian Vincent-Jones. Finnlando: Heta Kesälä; Päivi Saarinen. Germanio: Ottmár Járeb. Israelo: Jehoŝua Tilleman. Italio: Michela Lipari; Gianfranco Polerani. Nederlando: Louise Adelaar. Usono: George W. Partlow; R. Paul Lynch; Ruth Culbert; Sidney S. Culbert.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Britio: Ian C. Jackson; Judith Jackson; Robin Jackson; d-ro John C. Wells. Finnlando: Aleksii Romonen; Heta Kesälä; Anna-Liisa Heikkinen. Germanio: Albrecht Kronenberger; Werner Heinrich. Italio: F. Borromei Mascarucci. Nederlando: G.T. Knol; Louise Adelaar. Svedio: Olga Domeshek; Martin Hägg-

ström; Zinovi Kurolap. Ukrainio: Evgenij Kovtonjuk. Usono: Alberta Seabold Casey; Ruth Culbert.

DONACOJ 1995 (gld.) ĝis la 31-a de decembro

(La tutjaraj sumoj indikas ne la staton de la koncernaj kontoj/fondaĵoj sed la sumon de la donacoj en 1995.)

Asocia Kapitalo: Britio: Heredaĵo E.R. Holt 2450,00.

Fondaĵo Afriko: Anonima sinjorino: 500,00. Britio: A. Vincent-Jones 28,50. Francio: E-Grupo Boissy 141,43. Finnlando: A. Mehtonen 375,00. Italio: D. Trombetta 2387,10. Kanado: U.P. Ronald 25,00. Nederlando: N. v. Iperen 92,00; W.P. Roelofs 600,00. Sumo tutjara 17 929,56.

Fondaĵo Ameriko: Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Sumo tutjara 4021,62. **Konto Ĉinio:** Nederlando: N. Moerbeek-Bartels 100,00. Sumo tutjara 300,00.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: T. Metherall 14,18. Aŭstrio: G. Kranl 14,31. Britio: B. Najbaro 47,43. Germanio: G. Macioszek 225,00. Honkongo: W. Breitung 223,50. Italio: G. Mantelli 10,00; S. Zanichelli 10,00. Japanio (por aziaj eistoj): S. Hasiguti 31,72; K. Kaheki 158,60; K. Kenmotu 31,72; T. Kobayasi 31,72; N. Nisimura 31,72; G.G. Pompilio 14,26; S. Yamazoe 31,72. Nederlando: Anonime 50,00; H. ten Hagen 20,00; E. ten Hagen 20,00; O. Hoekstra

200,00; S. Milojević 109,45; G. Peet 53,00; W.P. Roelofs 200,00; D. van Zanten 50,00. Diversaj malgrandaj 18,90. Sumo tutjara 14 740,07.

Ĝenerala Kaso: Britio: W. Farrier 12,35; A. Vincent-Jones 28,50. Nederlando: Roterdama E.S. "Merkurio" 500,00. Svedio: B. Sandelin 11,05. Usono: W.K. Bledsoe 161,00; A.A. Fonseca 16,10; L.M. Gregg 16,10; D.C. Halley 161,00. Diversaj malgrandaj 17,83. Sumo tutjara 5709,63.

Konto Espero: Anonima sinjorino 100,00. Britio: Bournemouth E-Society 41,99; W. McCallum 61,25; A. Vincent Jones 28,50. Kanado: J. Smythe 58,85. Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Sumo tutjara 2682,95.

Junulara Fondaĵo: Germanio: M. Funke 16,76. Sumo tutjara 216,76.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: J. Bishop 30,00; T. Metherall 14,18. Finnlando: I. Heikkilä 31,37. Germanio: D. Bindmann 13,00; P. Zilvar 13,00. Nederlando: Subvencio de Fondaĵo Grabowski 247,06; R. Moerbeek 200,00; W.P. Roelofs 200,00. P.A. van Waveren-v.Rosmalen 100,00. Svedio: R. Moln 26,62. Diversaj malgrandaj 25,90. Sumo tutjara 2861,00.

Volontula Fondaĵo: Aŭstralio: T. Metherall 14,18. Nederlando: O. Hoekstra 300,00. Diversaj malgrandaj 18,90. Sumo tutjara 2440,40.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Edward Symoens (1915-1995)



Edward Symoens, Honora Membro de UEA ekde 1993, mortis la 21-an de decembro en Kapellen (Belgio).

Symoens naskiĝis la 17-an de septembro 1915 en la usona Austin (Teksaso), sed vivis en Belgio. Li eklernis Esperanton en 1930 kaj tuj ekaktivis en studentaj medioj. En 1946 li gvidis nacian radiokurson. Dum sia longa kariero kiel eduka gvidanto kaj mezlerneja direktoro en la ĉefurboj de la nunaj Zairio (1947-1972) kaj Ruando (1972-75), li ankaŭ gvidis E-kursojn

kaj prelegis pri Esperanto. Dum plurmonataj restadoj en la 80-aj jaroj li helpis starigi E-kernon en Ruando.

Post reveno Eŭropon, li kungvidis gravan kolokvon pri Esperanto (1976), el kiu fontis renovigo de la movado en Flandrio kaj starigo de la E-Centro en Antverpeno. Li prezidis (1979-84) kaj vicprezidis (1984-90) Flandran E-Ligon, kaj iĝis honora FEL-prezidanto en 1990. Per siaj riĉa vivosperto kaj gravaj sociaj kontaktoj, li motoris la restrukturadon de la E-movado en Flandrio. En la LKK de la Antverpena UK (1982) li laboris kiel vicprezidanto. Dum multaj jaroj li animis la lokan grupon en Kalmthout, kaj fariĝis ankaŭ ties honora prezidanto.

Kiel komitatano de UEA (1979-92), li aktivis en komisionoj pri informado kaj elektoj. Li estis estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado (1984-). Li kunfondis (1989) la laborgrupon "Komunikado en la Eŭropa Komunumo" kaj aktive membris en ĝi.

Aparte elstaras lia rolo kiel vicprezidanto (1985-87), poste prezidanto (1987-91), de ILEI, kiu elektis lin honora

membro dum sia lastjara kongreso. La gvidlinioj kaj laborplanoj kiujn li lanĉis forte plu influas la funkciadon de la instruista asocio. Dank' al siaj solidaj ligoj al UEA, Symoens impulsis reproximiĝon de la du organizoj, kio kondukis al restarigo, en 1990, de la statuso de ILEI kiel faka asocio aliĝinta al UEA. Li instigis al la lanĉo de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI (1989), de kursoj por instruistoj (1992), kaj de aro da novaj eldonaĵoj.

El liaj provoj samtempe aliri diverslandajn eduk-ministeriojn per informkampanjo pri la sociopolitika, kultura, pedagogia kaj propedeŭtika valoro de Esperanto, naskiĝis utilaj informdokumentoj en pluraj lingvoj, aperintaj i.a. kiel Esperanto-Dokumentoj de UEA. Li kompilis *Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko* (1989) kaj ties suplementon (1995), iniciatis la eldonon de *Studoj pri la Internacia Lingvo* (1987) kaj *Orgena vortaro* (1989), kaj kunredaktis la prelegaron *La intereso kaj utilo de komuna interlingvo* (1988).

Per la forpaso de Edward Symoens la esperantistaro perdis homon kun kohera vizio, granda laborkapablo kaj persista kunagemo.

Josef Vondroušek (1904-1995)



Josef Vondroušek, Honora Membro de UEA ekde 1992, emerita bankoficisto, mortis la 6-an de decembro en Brno (Ĉeĥa Respubliko).

Li naskiĝis la 1-an de decembro 1904 en Brno, kie li pasigis sian vivon. Li lernis Esperanton en 1922. La movada vivo en Brno, ĝis tiam mal-

vigla pro idista konkurenco, intensiĝis kiam li en 1929 fariĝis sekretario de la loka klubo, al kiu li altiris multajn el siaj propraj kursanoj. Li prezidis la klubon inter 1945 kaj 1985 kaj redaktis ĝian bultenon dum kvin jardekoj. De post 1931 li estis komitatano de Ĉeĥoslovakia Asocio E-ista. Li estis inter la organizantoj de du ĉeĥoslovakaj kongresoj en Brno (1935, 1950) kaj de la fondkongreso (1969) de Ĉeĥa E-Asocio (ĈEA), kiu elektis lin sia honora membro en 1979. Li servis ankaŭ kiel komitatano de UEA (1946-1952) kaj, dum 65 jaroj ekde 1930, kiel delegito.

Vondroušek gvidis centojn da E-kursoj kaj instruis E-historion kaj -literaturon al somer-kursanoj en Rožnov pod Radhoštěm (1949-52) kaj poste 25 jarojn en la Somera E-Tendaro de Lančov, por kies bezono li verkis ĉitajn kompendiojn en la ĉeĥa kaj

Esperanto. Dum multaj jaroj li kunpripri-zorgis la E-ekzamenojn de ĈEA kaj havis meriton pri ilia alta nivelo. Li prelegis en la Somera E-Universitato de Gyula (Hungario) kaj aliaj aranĝoj, kiel Internacia Foira E-Renkontiĝo en Lepsiko.

Vondroušek ofte kontribuis al E-revuoj kaj de post la dua mondmilito multe tradukis el la ĉeĥa literaturo. Li elstare esperantigis novelojn kaj romanojn de Ĉapek: *Libro de apokrifoj* (1970), kies tradukon Kalocsay trovis "ĉiel laŭdinda"; *Rakontoj el unua poŝto kaj rakontoj el la dua poŝto* (1981) kaj *Milito kontraŭ salamandroj* (1994). Aperis krome: *Ĝojoj de mia vivo* (el A. Jirásek, K. Čapek kaj J. Šmíd, 1984), *El mia vivo* de V. Nezval (1985), *Ondro kaj drako*, dramo de Viktor Dyk (1986), *Karel Čapek* (antologieto, 1987), kaj *La propra biografio de Karolo la IV-a* (1995). Presprete aŭ manuskripte atendas aperon preskaŭ dudek liaj esperantigoj el ĉeĥaj verkoj — plejparte bonhumoraj, ĉar "en la mondo estas sufiĉe da malĝojoj".



"Ĉu vi parolas tendare?" estis origine verkita por instrui Esperanton dum labortendaroj. Hodiaŭ, kiam tiuj aranĝoj malpli furoras, tamen necesis ...

...4-a eldono!

Ĉu vi parolas tendare?

Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Rotterdamo: TEJO, 1992 (4-a eld.).
21cm. 12,00 gld. Triona rabato ekde
3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



Libroj kaj kasedoj el Israelo

• La kasedo "Israelo Kantas" kaj ĝia sekvanto "Israelo ne ĉesas Kanti" — kasedoj kun tekstoj de novaj kaj malnovaj, plej popularaj israelaj kaj judaj kantoj tradukitaj en Esperanton de J. Kohen-Cedek, J. Murĵan kaj A. Wandel, kantitaj de profesiaj kantistinoj, kun tekstoj. Po 24 gld. Ambaŭ kasedoj 40 gld.

• "La Krabo kiu ludis kun la maro" de Rudyard Kipling, traduko kaj enkonduko A. Wandel. Infanlibro de la jaro 1994. 28p, kolora fortika kovrilo, abunde ilustrita. Prezo: 12 gld.

• La senmorta Piano — Ĥ. Karmi, 1993, 80p, 10 gld.

• Por kio ĉapelo? — instru-broŝuro pri la supersignoj. J. Murĵan, 1993, 3,50 gld.

• Pri internacia lingvo dum jarcentoj — I. Dratwer, 1977, 336p, 5 gld.

• Antologio de la Hebrea poezio — J. Kohen-Cedek, 1987, 268p, 30 gld.

• Praktika vortaro Hebrea-Esperanta — J. Murĵan, 1989, 160p, 10 gld.

• Venis Vespero (infanlibro) — F. Bergstein, trad. A. Wandel, 1987, 20p, 5 gld.

• Salato — M. Savir, 1984, 160p, 15 gld.

• ELIZA (sprita komputila konversacia programo) — A. Wandel, 1988, 5- aŭ 3.5-cola disketo por IBM PC-komputiloj, kun instrukcioj, 9 gld.

Mendu ĉe Esperanto-Ligo en Israelo, POK 1289, IL-61012 Tel Aviv. Triona rabato ekde 3 ekz. Haveblas ankaŭ ĉe UEA.

LA NOVA REALISMO de Bruno Vogelmann, dua eldono, 185 p., 19,80 gld., ĉe ĉiuj libroservoj, Premio Deguĉi (Japanio), Premio FAME (Germanio), enhavas: Novan Pensadon kun ĝiaj reguloj, Religiecon Novstilan, agnoskitan de ateistoj ĝis Vatikano, mondkoncepton necesan por eviti pereon de l'homaro. Tradukita en 25 lingvojn por ne-esperantistoj. El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro: PK 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭkazajn servojn kaj publikajojn.

Antaŭ kelkaj jaroj aperis

HUNGARA KURSLIBRO

la plej ampleksa lernilo de nacia lingvo en Esperanto. En 1995 aperis unika

PAROLTURNARO

ĉefverko de H. & K. Wiersch: pli ol 20.000 parolturnoj en la germana kaj Esperanto, laŭ la germanaj ĉefvortoj.

Mendu ĉe la eldonejo Esperanto 2000 (Duisburgsestraat 12, BE-3001 Leuven, Belgio), ĉe FEL, ĉe UEA aŭ ĉe via landa libroservo.

Parolturnaro germana-Esperanto: 414 p, 20 cm, 42 gld aŭ 39 DM (+ sendokostoj).

Hungara kurslibro: 384 p, 20 cm, 39 gld (prezo ĉe la eldonejo, + sendokostoj)

Patrino koro

Simplaj, romantikaj rakontoj pri la esperantista vivo

Nevena Nedelĉeva. Rotterdam / La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./preso). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

ĈIUN APARTE AŬ LA TUTAN KVINOPON DE LA LIBROJ DE ALLAN KARDEC LA KUNORDIGINTO DE SPIRITISMO:

"La libro de la Spiritoj"

"La libro de la Mediumoj"

"La Evangelio laŭ Spiritismo"

"La ĉielo kaj la infero"

"Le Genezo" (baldaŭ aperonta)

sendos donace al ĉiu petinto: SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ, Caixa Postal 3133, Rio de Janeiro (RJ), 20001-970 Brazilo.

La Kosmologio de Martinus

Esperanto-semajno

11a - 17a de aŭgusto 1996 en Danio

La kosmologio montras ke ekzistas psikaj naturleĝoj pri pensado. Scio pri tio ebligas al la homo ekregi sian menson kaj future krei mondregnon surbaze de kosma logiko kaj humanismo. Petu senkostajn broŝurojn kaj provekzempleron de la revuo KOSMOS ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio.

☎ +45 3834 6280 - Fakso +45 3834 6180

Nenia unuiĝo aŭ membreco

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŜTAKTO estas gazeto
por ĉiu, kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŜTAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KŜTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda
Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la
kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994
(2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

La plej granda en la mondo!



**LIBROSERVO DE
UEA**

**Stokas ĉiun haveblan Esperanto-libron •
Rabatas ekde tri ekzempleroj • Sendokostoj
nur 10% • Rapida servo • Katalogo 9,00 gld.**

NIA LEGOLIBRO PLEJ RIĈA

Nova Esperanta Krestomatio

redaktita de William Auld

- klasikaj ekzercoj
- originalaj rakontoj
- ĉerpaĵoj el la mondliteraturo
- studoj "el vivo kaj sciencoj"
- prilingvaj artikoloj

kaj du unikaj antologietoj:

- La Esperanta Muzo
(la Majstro, la lingvo, la Ideo, satiro)
- Internacia Liriko
(specimena poemaro el 73 lingvoj)



Jubilea Kolekto n-ro 5. 509 p. 21 cm. Tole bindita kun kromkovrilo kaj paĝrubando.
57,00 gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: triona rabato ekde tri ekzempleroj.